

Esperanto
V. 10, 034/1992

ISSN 0032-4361

10

1992

中國新道

EL POPOLA

ĈINIO








Renkontiĝo de diversnaciaj junuloj sur Tian'anmen-placo

Foto de LIU SIGONG



Cigno Foto de LIU SIGONG

INTER NI

Koncerne niajn rubrikojn

— Respondo al s-ro Solomon kaj aliaj

Mi tre ŝatis “Al Niaj Legantoj” kaj proponas, ke daŭrigu redaktistaran, unupaĝan rubrikon, eble en kombino kun “Inter Ni”, en kiu vi povus komentarii la enhavon de kuranta numero, viajn metodojn, celojn ktp.

M. J. SOLOMON (Usono)

La propono de s-ro M. Solomon vekis nian grandan atenton. Nun ni konigas al niaj legantoj nian planon.

Ni aperigas mallongan artikolon similan al “Al Niaj Legantoj” en la unua numero ĉiujare kun celo saluti je la Nova Jaro niajn

legantojn, kontribuintojn, perantojn kaj amikojn, anonci la ĉefan enhavon kaj novajn rubrikojn de EPĈ en la tuta jaro kaj konigi la ŝanĝigon de paĝo-aranĝo kaj planojn de la redakcio. “Inter Ni”, kiel rubriko, aperas en ĉiu numero por esprimi dezirojn kaj opiniojn de niaj legantoj kaj faciligi interparolon inter redaktoroj kaj legantoj. Fakte ĝi estas malsama ol “Al Niaj Legantoj” en la enhavo.

Delonge, la angulo por “Inter Ni” estas malgranda, pro tio ni ne povis diri ĉion, kion ni volis. Akceptinte la opinion de M. Solomon, ni iom grandigis ĝian angulon ekde la 7-a numero ĉi-jare, tio estas favora al la redaktoroj kaj legantoj por interŝanĝo de iliaj opinioj. Ni estas ĝojaj, ke la rubriko estas ŝatata de la legantoj. Ni plibonigos nian laboron, esperante, ke vi donos, kiel antaŭe, viajn opiniojn pri la revuo.

Tiu numero aperas je la 43-a

datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Okaze de tio, ni raportas per pli multe da paĝoj progreson de la ekonomia konstruado kaj la novan aspekton de nia lando post ekpraktikado de la reforma kaj pordmalferma politikoj. La artikolo “Por Realigo de la Revo” raportas pri la ĉina aŭta urbo. Vi legos, kiel ĉinoj vekis en la 70-aj jaroj monton el profunda dormo kaj starigis grandan aŭtofabrikon en dezerta valo.

Varia estas la enhavo de aliaj artikoloj. La artikolo “Qinghai-lago sur Altebenajo” kondukas nin al Qinghai-lago, kies blua akvo, bela pejzaĝo kaj kultado far la lokanoj profunde impresos la legantojn. Ĉu vi ŝatas ĉin-stilajn pentraĵojn? Eble jes. Ĉu vi iam vidis pentraĵojn faritajn per fingroj, anstataŭ per penikoj? Eble ne. La pentraĵoj de s-ro Gong Naichang larĝigos vian vidkampon ĉi-flanke.

La Red.


ENHAVO

- 6 **Por realigo de la revo**
- 8 **Rigardi la hodiaŭan postiĝinta**
- 21 Prosperaj urbataj entreprenoj en Wuxi-gubernio
- 42 **HISTORIA MISTERO:**
Iom pri "Ji Ĝing"
- 40 Amuzaj sportoj
- 34 Fingra pikturo de Gong Naichang
- 18 Reĝo de kantado (Novelo)
- 50 **EL ĈINAJ GAZETOJ**
- 36 Ĝjaŭzi-o tradicia manĝaĵo de Ĉinio
- 38 Senlaca fotistino
- 27 **SUR STRATOJ:**
Floroj sur la stratoj
- 44 **LOĜDOMOJ KAJ MOROJ:**
Prosperas la vilaĝo Liuminying
- 51 **LAŬ ANTIKVA VOJO AL TIBETO (XI):**
Qinghai-lago sur altebenaĵo
- 31 La simbolo de amikeco inter du foraj

- urboj
- 24 En mita mondo
- 30 **AMUZOJ**
- 12 Memore al verda vojaĝo en Japanio
- 15 En Esperanto-kurso
- 13 **Esperanto en la vivo de urala skolto**
- 48 **KURANTAJ AFEROJ**
- 17 **ESP-NOVAĴOJ**
- 16 **POR KOMENCANTOJ:**
Kredu vian infanon
- 41 **KORESPONDI DEZIRAS**
- 4 **INTER NI**
SUR LA KOVRILLO:
Mastrino de tetrinkejo Foto de LIU SIGONG
- 2 Renkontiĝo de diversnaciaj junuloj sur Tian'anmen-placo
- 4 Cigno
- 32 Interesaj ŝtonoj
SUR LA DORSKOVRILO:
[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]
Ligna kirko en Östmark, Svedio
Norvega spegulo

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

- 1. Shiyang (p. 6)
- 2. Wuxi-gubernio (p. 21)
- 3. Shenyang (p. 40)
- 4. Cangzhou (p. 38)



Por realigo de la revo

— Vizito al la Aŭto-industria Korporacio Aeolus

de LU CHUANBIAO

CE miaj manoj estas materialoj, kiuj notis la neforgeseblan historion de la ĉina popolo kaj aŭto: En 1949 Ĉinio havis nur 50 000 aŭtojn tute importitajn. Tiutempe estis 450 milionoj da ĉinaj loĝantoj, do ĉirkaŭ 10 000 homoj posedis unu aŭton.

Kiamaniere disvolvi la aŭto-industrion? Ĉu daŭre importi aŭtojn? Tamen Ĉinio ne havis monon por tio. Kiam Ĉinio povas havi sian propran nacian aŭto-industrion, deziratan de kelkcent milionoj da loĝantoj? Finfine en la 50-aj jaroj Ĉinio ekhavis sian unuan aŭto-fabrikon kaj en la 60-aj jaroj la duan, nome la nunan Aŭto-industrian Korporacion Aeolus.

Kiam mi unuafoje vidis aŭton kun marko Aeolus kuri plensarĝita sur ŝoseo kune kun aliaj aŭtoj, mi rimarkis nenian diferencon. Sed ĉi-foje, kiam mi faris intervjuon en ĝia produktejo, la urbo Shiyan de la provinco Hubei, mi trovis, ke ĝi estas vere eksterordinara.

**LA PLEJ GRANDA
AŬTO-PRODUKTA BAZO
DE ĈINIO**



S-ro Chen Qingtai

Tiutage mi veturis per aŭto sur zigzaga montvojo. Post 4-hora tanguado, mi atingis ĉe vespera krepusko la celokon — la Aŭto-industrian Korporacion Aeolus.

Starante sur montpinto kaj rigardante malsupren, mi vidis, ke en la longa tamen mallarĝa valo orde staras vicoj da domoj altaj kaj malaltaj. Xiao Deng, laboranto de

la korporacio, diris al mi, ke la korporacio havas sume 36 fakajn fabrikojn, inter kiuj 27 dislokiĝas en tiu valo longa je 30 kilometroj kaj larĝa je 8 kilometroj. Baldaŭ la suno subiris kaj pompe eklumis la tuta valo. Antaŭ miaj okuloj aperis malofta monta pejzaĝo.

Kelkajn tagojn mi iradis tra la valo, vizitis la ĉefajn establaĵojn, kiel muldejo, ĉasia fabriko, karoseria fabriko, ĝenerala muntejo kaj teknika centro. Kvankam plejparto de la fabriksdomoj estas malnova, tamen ne mankas teknikoj kaj ekipaĵoj rigardataj kiel gloro de la laboristoj kaj oficistoj.

Shiyan antaŭe estis urbeto kun dekoj da familioj. Dank' al penema konstruado de dekmiloj da laboristoj kaj oficistoj de la korporacio, ĝi jam fariĝis mezgranda urbo kun pli ol 300 000 loĝantoj. En 1987 la korporacio produktis pli ol 100 000 aŭtojn kaj fariĝis la plej granda aŭtoprodukta bazo de Ĉinio kaj unu el la tri grandaj fabrikoj de mezpezaj kamionoj de la mondo.

Nun la jara produkta povo de la korporacio estas 150 000 kamionoj de 7 bazaj tipoj kaj pli ol 150 varioj. Ĉe la ĉefa muntolinio, longa je 240 metroj, naskiĝas po 2.5

minutoj unu aŭto, kia 2.5-tuna kampa aŭto, 3.5-tuna kampa aŭto aŭ 5-tuna ŝarĝaŭto. Ĝis 1991 la korporacio jam produktis pli ol milionon da aŭtoj de 40 specoj. La de ĝi produktitaj aŭtoj kun marko Aeolus kaj aŭtopecoj importiĝis al Tajlando, Filipinoj, Sudano, Ĉilio, Japanio, Germanio kaj Usono.

ZIGZAGA VOJO

Oni diras, ke ĉiuj vizitantoj, kiuj venis al la valo transirinte montojn kaj vidis la grandskalan produktadon de la korporacio, senescepte starigis tiajn demandojn, kiamaniere oni aranĝis la manĝadon kaj loĝadon de dekmiloj da konstruantoj, kiam ili kolektiĝis tie, kie estas nur zigzaga montvojo anstataŭ fervojo, kiamaniere ili sukcesis transporti dekojn kaj eĉ centojn da tunoj da ekipaĵoj. Iuj fremdlandaj vizitantoj eĉ ne povis kompreni, pro kio oni konstruis tian modernan entreprenon en montvalo.

Rilate al la lasta demando, la korporacianoj povas diri nur, ke tio estis deviga elekto sub la tiamaj specifaj kondiĉoj. Ĝuste pro tiuj specifaj kondiĉoj de Ĉinio la korporacio disvolviĝis zigzage, kiel la zigzaga montvojo kondukanta al ĝi.

Malnovaj laboristoj diris, ke la korporacianoj kun aĝo de ĉirkaŭ 40 jaroj senescepte loĝis siatempe en kabanoj, manĝis sekajn farunaĵojn kaj peklitajn legomojn. Ĉiuj ekipaĵoj estis transportitaj de ili per la ŝultroj.

Krome ilin baris ankaŭ aliaj malfaciloj. Tiel frue kiel en la 50-aj jaroj, kiam la unua aŭtofabriko estis finkonstruita kaj inaŭgurita, la ŝtato jam planis konstrui la duan, sed pro plurfoja reguligo de la nacia ekonomio la plano estis prokrastita. Fine de la 60-aj jaroj komenciĝis la prospektado kaj projektado. En la unuaj jaroj la korporacio progresis malrapide. Dum la 10 jaroj de 1969 ĝis 1978 ĝi produktis nur 5 000 aŭtojn. Por atingi la projektitan produktan povon estis bezonataj ankoraŭ 700 milionoj da juanoj. Tiutempe nia

lando renkontis financan malfacilon, tial la korporacio estis traktata kiel prokrastebla entrepreno kaj falis denove en dilemon.

REFORMADO SAVIS LA KORPORACION

Respondeculoj de la korporacio konsciis, ke ĉesigi la konstruadon de la korporacio signifas forjeti ĉiujn ekipaĵojn kaj kaŭzi grandegan perdon. Pli serioze estis, ke tio perdigis la konfidon de laboristoj. Por ŝanĝi tiun situacion, la respondeculoj decidis liberigi sin de la malnova formulo "konstrui la korporacion per ŝtata investo kun tutlanda subteno" kaj ellaboris la novan planon "preni la korporacian investon kiel la ĉefan, mem kolekti monon, elspezi laŭ la enspezo kaj disvolvi la korporacion paŝon post paŝo". Tiu plano estis sankciita de la instanco.

En la sekvaj 10 jaroj la korporacio kaptis ĉiun favoran ŝancon por antaŭenpuŝi sian reformadon kaj perfektigi sian administran sistemon. Ĝi atingis sukcesojn ĉiujare. En 1980 la korporacio ekpraktikis ĉiuflankan administradon pri kvalito. Tio metis solidan bazon por konduki la aŭtojn kun marko Aeolus en merkatan konkurencon. En 1985 la korporacio ellaboris la formulon "memstare administri, mem respondeci pri gajno kaj perdo, sin disvolvi kaj regi", tiamaniere unuapaŝe formiĝis la interna administra sistemo responda al la postuloj de la komercaĵa ekonomio. Dank' al ĉio ĉi multe altiĝis la produkta povo, la kvalito de la produktoj kaj la profito de la korporacio. En 1987 la korporacio produktis pli ol 110 000 aŭtojn kaj enviciĝis inter la grandaj kamionproduktaj entreprenoj de la mondo.

En la lastaj jaroj la korporacio plirapidigis siajn paŝojn. Ĝi ne nur produktis 145 specojn da aŭtoj kaj 16 specojn da motoroj, sed ankaŭ muntis aŭtojn de kelkcent specoj laŭ la bezonoj de la merkato. El la 34 specoj de ĝiaj eksportataj aŭtoj 31 jam atingis la normon de la internacia merkato.

Inspirate de la evoluo de la korporacio, la korporacianoj ripetade plivastigis sian produktadon. Ili konstruis alian aŭto-produktan bazon en la urbo Xiangfan, je 200 kilometroj oriente de Shiyang. Laŭ plano tiu bazo ĉiujare produktos 10 000 8-tunajn dizelajn aŭtojn kaj 60 000 dizelajn motorojn. Jam sukcese provfabrikiĝis tia aŭto. Ankaŭ tia motoro estas provfarata helpe de la enkondukita fremdlanda avangarda tekniko. Laŭ difino de la ŝtato, la korporacio estas ĉefa fabriko de ordinaraj personaŭtoj por la venontaj jaroj. Ĝi jam subskribis kunlaboran kontrakton kun fremdlanda korporacio. Laŭ la kontrakto, en la 90-aj jaroj ĝia jara produkta povo estos 300 000 ordinaraj personaŭtoj kaj 400 000 motoroj. Por tio ĝi planas konstrui plian muntejon en Wuhan, la ĉefurbo de la provinco Hubei.

La korporacio nun jam estas sinteza aŭto-produkta grupo, nome la Unuigita Administra Aŭta Korporacio Aeolus, kiu fondiĝis en 1981 kaj konsistas el 8 entreprenoj. Ĝiaj filioj nun troviĝas en 29 municipoj kaj provincoj enlande.

Pri siaj atingoj fabrikestro Chen Qingtai diris: "Estas la reformado, kiu savis nian korporacion. Ni devas nin apogi plu sur la reformado por ankoraŭ pli grandaj atingoj."

ORDINARAJ KONSTRUANTOJ

Retrorigardante la 20-jaran historion de la korporacio, Chen Qingtai diris: "Unuvorte, tio estas tutkore kaj tutanime nin apogi sur la laboristoj kaj oficistoj, sentime porti eksterordinarajn premojn kaj danĝerojn kaj renkonti pli severan defion."

Liaj vortoj estas konfido al ĉiu konstruanto, kiu faris penigan laboron tie por disvolvi la ĉinan aŭtan aferon. Inter tiuj konstruantoj estas laboristoj, inĝenieroj, teknikistoj kaj gvidantoj. Sube mi prezentos du ekzemplojn. Iliaj faroj estas ordinaraj, tamen kortuŝaj.

S-ro Yao estas ĉefinĝeniero de la teknika centro. Li aĝas 57 jarojn, kun grizaj haroj. Antaŭ 25 jaroj,

Rigardi la hodiaŭan postginta

Teksto de LI QIANG

Fotoj de WU XINHUA

S-ro Chen Qingtai, ĉefdirektoro de la Unuigita Aŭto-industria korporacio Aeolus, iam diris: "Ni rigardas la hodiaŭan postginta." Tio estas devizo por li kaj la 80 000 laboristoj.

La sciencaj kaj teknikaj laborantoj kaj laboristoj de la korporacio direktas sian atenton al la plej avangarda nivelo de la mondo kaj neniam kontentiĝas je sia sukceso. Ili zorgeme analizas informojn pri avangarda scienco kaj tekniko en kaj ekster Ĉinio kaj samtempe plenenergie ekspluatas novajn teknologiojn, materialon kaj novan tipon por servigi ilin ne nur al la

hodiaŭo sed ankaŭ al la morgaŭo kaj postmorgaŭo. Laŭ ilia opinio, la morgaŭo ne devas esti ripetigo de la hodiaŭo, sed pli bela ol ĝi.

La korporacio havas sub si teknan centron, kie laboras 1 100 sciencaj kaj teknikaj laborantoj. Kiel sinteza establo, ĝi posedas fakojn por antaŭvidi la merkaton, ekspluati aŭtomobilajn produktojn, disvolvi teknologiojn, analizi materialon, ktp. Tie oni okupiĝas pri planizo, projektado, provfardo kaj aliaj rilataj al la produktado. La teknika centro estas provizita per 1 500 aparatoj kaj moderna kaj sinteza provstirejo de aŭtoj, la plej granda en Ĉinio, kaj per tio

formiĝis kompleta sistemo de la aŭtomobila industrio.

Enirante tra la pordo de la centro, oni povas vidi longan tabulon kun la surskribo: Transformi, disvolvi kaj anticipi esplori produkto-serion. Tio montras, ke la sciencaj kaj teknikaj laborantoj strebas senĉese al reformo kaj progreso. La korporacio produktas ŝarĝaŭtojn kun kapacito de 5-8 tunoj, kiuj dividiĝas en 7 seriojn kun 150 tipoj. Miliono da aŭtoj kun marko Aeolus kuradas en Ĉinio kaj aliaj 16 landoj kaj regionoj. Ili estas tre bonvenaj al uzantoj pro siaj granda ĉevalpovo, alta rapido, malgranda konsumo de oleo, adaptiĝemo al medio kaj solida funkcio.

La 5-tuna ŝarĝaŭto kun marko Aeolus EQ140 estas frua produkto de la korporacio. En 1988 ĝi estis difinita kiel unuaranga produkto de la ŝtato kaj la motoro — premiita kiel bonkvalita produkto de Hubei-provinco, kie situas la korporacio. Tamen, sciencaj kaj teknikaj laborantoj opiniis, ke la motoro havas iajn mankojn. Ili sidis super la funkcio kaj solideco de produkto kaj la muntiteco, pureco kaj prilaboriteco de ĉiuj pecoj kaj prezentis proponojn por plibonigi ĝin. Oktobre de 1990, plejparto de la proponoj estis akceptita kaj la reformita motoro estis aljuĝita kiel elstara produkto de la koncerna ministerio. Oni fiksas la novan motoron sur aŭtomobilo kaj el praktika uzado faris al ĝi kelkajn plibonigojn, uzante pli ol 50 novajn teknikojn kaj materialojn, ke la


kiam li venis al la valo, ĝi estis dezerta. Li kun siaj kolegoj laboris en kabano, elektis kaj projektis aŭtotipojn por la korporacio. Li elaboris projektojn EQ 140-1, EQ 140-2 kaj EQ 140-3, kiuj estis akceptitaj. Lia edzino antaŭe sin okupis pri teatraĵoj. Por subteni lian laboron, ŝi forlasis sian profesion kaj venis al la valo por partopreni en la konstruado de la korporacio. Nun ankaŭ ilia filino laboras en la korporacio. S-ro Yao diris al mi, ke en la domo de la teknika centro

diligente laboras pli ol mil inĝineroj kaj teknikistoj. Multaj el ili laboras en la korporacio ekde ĝia fondiĝo. Tiam ili estis sangvinaj junuloj kaj nun jam fariĝis grizharaj, tamen ili restas ambiciaj en sia laboro.

Mi konatiĝis kun junulo Wang Junmin. Li estas kaj teknikisto kaj aŭtoprovanto. Plejparton da tempo li laboras eksterdome, jen sur ŝoseo aŭ en flughaveno, kun diversaj instrumentoj faras bruomildigan eksperimenton, jen veturigas aŭton

sur malebenaĵoj en fora loko aŭ en aŭtoprovejo, spertante rapidegan kuradon kaj drastan tangadon. Ankaŭ lia edzino laboras en la korporacio. Lia filo estas ankoraŭ juna, kaj li ne povas zorgi pri li pro la okupiteco. Lia laboro estas streĉa, laciga kaj danĝera, kaj kelkfoje oni volis anstataŭi lin, sed li ne konsentis. Li diris, ke li estas sperta kaj devas multe labori por evitigi danĝeron al siaj kolegoj.

Ili estas ordinaraj konstruantoj de la korporacio. ■



S-ro Yao Qixu en la teknika centro



S-ro Xu Zhiqing (dekstre) en laborejo

aŭtomobilo ricevis pli grandan reformon. Produktiĝis en granda nombro aŭtoj kun marko Aeolus EQ140-1 kaj estis aljuĝitaj kiel bonkvalita produkto de la ŝtato oktobre de 1991. Tiamaniere la ŝarĝaŭto kun marko Aeolus estas tre bonvena al la merkato.

En la okuloj de sciencaj kaj teknikaj laborantoj, la superecoj de ia nova produkto estas nur relativaj, sekve ili devas senĉese enpreni en sin avangardajn teknikojn de la mondo. En unu jaro ili faris ĉ. 60 plibonigojn al la supre menciita aŭtomobilo kaj sukcese provfaris pli avangardan ŝarĝaŭton kun marko Aeolus EQ140-2. Preskaŭ en la sama tempo, en la eksperimentejo aperis la unua specimeno de la monde avangarda ŝarĝaŭto kun marko Aeolus EQ140-3.

La gvidantoj de la korporacio

bone komprenas, ke la progreso de entrepreno en scienco kaj tekniko dependas ne nur de sciencaj kaj teknikaj laborantoj, sed ankaŭ de la aktiva partopreno de la tuta laboristaro. Tial ili turnas sian grandan atenton al la amasa aktivado de teknika reformado kaj racia konsilo. Ili alvokas ĉiun laboriston serĉi ian plibonigeblecon sur sia laborposteno, kio rimarkinde stimulis la aktivecon de laboristoj. En 1991 la 80 000 laboristoj faris 415 000 konsilojn, inter kiuj 320 000 estis akceptitaj. El la akceptitaj 250 000 estis aplikitaj, kun ekonomia profito de 49.03 milionoj da juanoj (5.4 juanoj egalas al unu usona dolaro).

La Unua Fabriko de Muldajoj sub la korporacio estas granda specifa fabriko. En ĉiu ĝia laborejo estas starigita afiŝo-tabulo, sur kiu skribiĝas merito de reformintoj.

Sur afiŝo-tabulo mi legis la nomon de konsilinto Huang Zhangwei, lian konsilon kaj la daton. Tia afiŝo-tabulo kuraĝigas kaj la konsilinton mem kaj la aliajn. En la daŭro de pli ol duonjaro la laboristoj de la fabri-

ko prezentis 14 300 konsilojn al la fabriko, kiuj donis profiton de 1.5 milionoj da juanoj. Presentante sian proponon, iu diris al la fabrikestro, ke li rigardas proponoprezenton kiel sian devon. Li opiniis, ke krom la fabrikestro, ankaŭ ĉiuj laboristoj devas zorgi pri la disvolviĝo de la fabriko.

Dum la amasa aktivado aperis nemalmultaj antaŭirantoj. Maje de 1992, la korporacio Aeolus okazigis la unuan kunvenon por premii sciencajn kaj teknikajn laborantojn. En la kunveno 16 sciencaj kaj teknikaj laborantoj kaj 3 laboristoj ricevis monpremion kaj honoratestilon. Supera inĝeniero Yao Qixu de la teknika centro okupiĝis pri aŭtoprojektado jam pli ol 30 jarojn. Li partoprenis aŭ direktis la projektadon de la aŭtoj EQ140, EQ140-1 kaj EQ140-2 kaj la altebenaĵa aŭtoj EQ140, formadon kaj ekspluatadon de la aŭtoj EQ240 kaj ties vario. Li estis plurfoje rekompencita per premio por scienca kaj teknika progreso. Kiel klera laboristo, Xu Zhiqing de la patrica fabriko bone plenumis multe da laboroj altteknikaj kaj riskoplenaj, faris dekojn da teknikaj reformoj kaj dediĉis multajn disertaciojn, dank' al kio li ricevis premion de sciencaj kaj teknikaj fruktoj. Kiam la maljunaj intelektuloj kaj novtipaj laboristoj estis premiataj sur estrado, ĉiuj aplaudis ilin varme.

Laŭ la opinio de s-ro Chen Qingtai, homoj estas la plej grava

Germana instruisto en la teknika lernejo






En muntejo

faktoro por bone funkciigi entreprenon. Unuvorte, la konkurenco de entreprenoj estas esence tiu de talentuloj. Kaj la ŝlosilo por elkulturigi talentulojn kuŝas en edukado. La gvidantoj de la korporacio neniam ŝparas monon por edukado. Nun la korporacio funkciigas 8 altajn lernejojn kaj teknikajn kolegiojn kaj 51 mezgradajn kaj elementajn lernejojn. Kaj la pokapa elspezo por edukado estas 7.3-oble

pli alta ol tiu de meznumero de Ĉinio. Krom tio, ili alte taksas ankaŭ la altiĝon de la kvalito de la tuta laboristaro. Ili starigis kompletigitan edukan reton kaj trejnas laboristojn per diversaj manieroj.

La Aŭtoinstituto funkciigata de la korporacio celas kulturigi superajn inĝenierojn por la aŭtomobila industrio. Ĝis nun la instituto faris 4 staĝojn de fabrikestroj kaj 9 staĝojn de laborejestroj, por ke ili

povu sin konformi al la moderna produktado. La kompanio kaj la Fonduso de Hans de Germanio kune funkciigas teknikan lernejon, alprenante la metodon de profesia edukado de Germanio nome kun entreprenoj kiel la ĉefa instruanto kaj lernejo kiel la helpa, kulturigi kvalifikitajn laboristojn. Nun ĝiaj 368 diplomitoj ludas ĉefan rolon en produktado kaj faras sian eblon por krei belan morgaŭon. ■



Parto de Shiyuan

Foto de MA DENGQI



Aŭto en provado

Aŭtoj kun marko Aeolus eksportotaj



Memore al verda vojaĝo en Japanio

ANTAŬ tri jaroj, invitite de s-ro Tokuda Rokuro, prezidanto de la Ŝizuoka Esperanto-Klubo de Japanio, sinjorino Hu Menggu, nepino de s-ro Hujucz, kaj ŝia filino vizitis Japanion dek tagojn. Mi vojaĝis kune kun ili kiel ilia akompananto. Dank' al multaj zorgoj de s-ro Tokuda Rokuro kaj afablaj helpoj de diverslokaj japanaj samideanoj, nia tagordo estis aranĝita enhavoriĉe kaj interesplene. Ni faris amikajn kontaktojn kun japanaj esperantistoj kaj ĝuis ĉarmajn naturajn pejzaĝojn kaj karakterizajn morojn de la sakura lando.

GASTADO EN TOKIO

La 20-an de aprilo 1989 ni forlasis Ŝanhajon kaj venis al Osaka de Japanio. En la aerodromo Narita nin bonvenigis s-ro Jutaka Jamano, vicprezidanto de la Tokia Esperanto-Klubo, kiu atendis nin levante verdstelan flagon. Ni trajne veturis al Tokio. Kiel mondfama urbo, Tokio jam en la unua tago de mia vizito donis al mi profundan impreson, kiun japanstile spicis la samtaga vespermanĝo de ekzotika nekuirita fiŝaĵo. En kvar tagoj, kiam ni gastis en Tokio, la Tokia Esperanto-Klubo preparis por ni riĉan programon: Ni ascendis la Sunan Domegon, la plej altan konstruaĵon en Azio, kaj havis panoraman vidon al Tokio; ni vizitis la mezlernejon Akasaka, kie oni instruas ankaŭ Esperanton al mezlernejanoj; ni ekskursis kune kun lokaj samideanoj al la Mikada Sanktejo kaj aliaj famaj vidindejoj. Mi ĉeestis kunsidon aranĝitan de la Japana Esperanto-Instituto, en kiu ĉinaj kaj japanaj samideanoj interŝanĝis opiniojn pri la movado en ambaŭ landoj. Krome, nian vojaĝon en Tokio ankoraŭ pli buntigis la ekskurso al Diznilando plena de gajeco.

EKVIDIĜO DE FUĴI-MONTO

Adiaŭinte Tokion, ni alvenis al la urbo Maĉida. Sub la gvido de s-ro Acuo Ooba, prezidanto de la Tokia Esperanto-Klubo, kunsidis ni kaj dekelkaj profesoroj kaj funkciuloj de la Universitato Oobirin. La profesoroj elmetis serion da demandoj ekzemple pri Konfuceo kaj Mengzi kaj eĉ pri la nuntempa naskolimiga politiko, montrante grandan scivolemon pri la estinteco kaj la estanteco de Ĉinio. Ili esprimis altan respekton al s-ro Hujucz, rigardante lin kiel disĉiplon de Lusin. Sinjorino Hu Menggu estas erudiciulo. Ŝi bele prelegis kaj kontentige respondis iliajn demandojn unu post alia. Tio estas

signifoplena kultura interŝanĝo ŝatata de ambaŭ flankoj.

La 25-an de aprilo ni atingis la urbon Hakone. Akompanate de lokaj samideanoj, ni ekskursis al la belega nacia parko. Tie ni vizitis la mirindan Subĉielan Muzeon de Skulptaĵoj kaj la Memordomon de Pikaso. Poste ni iris al la monto Hakone, konata kiel vivanta vulkano. De malproksime vidiĝis blanka fumo kaj nebulo sur la montodeklivo, kaj la vento odoris je sulfuro. En termofonto sur la monto bolis la akvo, en kiu oni kuiris ovojn. Laŭdire, tie kuiritaj ovoj estas bonaĝuraj. Do mi prenis unu ovon, min mem benante pri feliĉo kaj bonŝanco. Subite aŭdiĝis la voĉo de nia akompananto sinjorino Ai Midori: "Rigardu! Jen Fuĵi-monto!" Surprizite de tiu ĝojiga informo, mi tuj kuris al ŝi kaj serĉis per miaj okuloj la delonge konatan figuron. Malproksime, la blanka pinto floris inter la diafanaj nuboj kaj nebuloj, sin vidigante jen klare jen malklare, kaj fine tute malaperis malgraŭ mia atendado. S-ro Kimiaki Kurita, prezidanto de la Japana Pacdefenda Esperantista Asocio, kiu ĉiĉeronis por ni en la ekskurso, diris, ke en serenaj tagoj oni povas klare vidi Fuĵi-monton starante sur la monto Hakone. Sed tiutage la vetero estis nuba, tial kaŝiĝis la monto. Tamen mi jam vidis ĝin bonŝance.

INTERVIDIĜO EN ŜIZUOKA

Forlasinte la urbon Hakone, ni estis varme akceptataj de samideanoj de la urboj Numazu kaj Miŝima en kunsido, kunmanĝado kaj ekskurso. Poste la samideana stafeto sendis nin per trajno rekte al Ŝizuoka, al estimata s-ro Tokuda Rokuro.

S-ino Hu Menggu, s-ro Jutaka Jamano kaj la aŭtoro (maldekstre)





Nikolaj Ivanoviĉ Kuznecov en 1928

LARISA KUZMENKO (Rusio):

Esperanto en la vivo de urala skolto

MALJUNULOJ de la urala urbo Talica ankoraŭ memoras pri la afiŝoj de la 30-aj jaroj, kiuj

alvokis laboristojn de la urbo studi la "plej facilan lingvon Esperanto". Sur la afiŝoj interalie oni povis legi: "Rapidu! La registrado en la klubo nur unu tagon!"

La unuaj, kiuj reĥis, estis sep-klasanoj de la loka lernejo. Nikolaj Ivanoviĉ Kuznecov (1911-1944),

fama sovetia skolto, studis tiam en la sepa klaso, bone sciis la germanan lingvon kaj estis lernanto de S. A. Suetin, aktiva partoprenanto de la internacia Esperanto-movado.

Lernante Esperanton, Nikolaj unuafoje konatiĝis kun la scienco pri internaciaj lingvoj, inter-

La flugrapida trajno haltis ĉe la stacidomo. Tra trajna fenestro ni jam vidis bonvenigantojn kaj antaŭvice s-ron Tokuda Rokuro. Sin iom apogante sur bastono, li tenere rigardis nin kaj ridetis. Finfine! De la tago, kiam ni atingis Japanion, ni atendis tiun intervidiĝon! Sinjorino Hu Menggu apenaŭ povis sin deteni de forta ekscitiĝo, kaj larmoj ruliĝis en ŝiaj grandaj belaj okuloj. Ŝi tenis manon de la maljunulo, eĉ ne povante diri la ripetade parkerigitajn vortojn.

Mi tute komprenis ŝian senton en tiu momento. Ŝia avo s-ro Hujucz kaj s-ro Tokuda Rokuro starigis inter si profundan amikecon en la klopodado por la ĉina-japana amikeco kaj Esperanto-movado. S-ro Tokuda Rokuro foje invitis s-ron Hujucz viziti Japanion, kaj la lasta akceptis la inviton. Bedaŭrinde, s-ro Hujucz forpasis en 1986 antaŭ ol plenumi la

En la hejmo de s-ro Tokuda Rokuro (meze de la malantaŭa vico)



viziton. Por memori sian karan amikon kaj akceli la amikan kontaktiĝon inter la japanaj kaj ĉinaj esperantistoj, s-ro Tokuda Rokuro ripetis sian inviton al la nepino de s-ro Hujucz, informiĝinte, ke ŝi estas esperantistino. Li esperas, ke juna generacio heredos la grandan aferon de la maljuna generacio kaj daŭrigos la amikecon inter la dulandaj esperantistoj.

La deziro de s-ro Tokuda Rokuro certe realiĝos. En Ŝizuoka ni ĝoje rimarkis, ke iniciatite de s-ro Tokuda Rokuro, multaj elementlernejoj lernas Esperanton. Okaze de la bonveniga ceremonio ili diris al ni salutajn vortojn en Esperanto. Sincera entuziasmo, perfekta parolado kaj vicleplena esprimo de la infanoj profunde tuŝis mian koron. Ili estas espero de Esperanto.

(Daŭrigo sur p. 30)

La aŭtoro (la sesa de dekstre) kaj samideanoj de Oomoto



lingvistiko. Tiam li revis dediĉis sian vivon al lingvostudado.

Post la fino de sep klasoj de la Talica lernejo, Nikolaj daŭrigis la studadon de Esperanto en la siberia urbo Tjumeno. Tie li eniris la unuan kurson de la agrikultura teknika lernejo kaj vespere vizitis Esperanto-klubon. La rondeton el 40 lernantoj gvidis la sperta esperantisto Georgij Nikolajevič Besedniĥ.

Iun vesperon en oktobra pluva vetero Georgij Nikolajevič rapidis al la klubo. Hodiaŭ li havos la unuan lecionon kun la novaj rondetanoj. En sia menso li poluris sian unuan konversacion kun la rondeto. Li intencis rakonti pri la vivo de la pola kuracisto Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto.

— Pardonu min, kamarado, ĉu vi povas indiki al mi la straton Irkutakaja? — aŭdiĝis ies voĉo. Georgij Nikolajevič turnis la kapon kaj ekvidis maldikan deksejaron knabon antaŭ si.

“Eble li estas esperantisto”, — pripensis Georgij Nikolajevič, “Tamen, ne, sufiĉe juna li estas.”

— Iru kune. Mi iras samdirekte.

Post mallonga silento li neatendite demandis:

— Pardonu, junulo, ĉu vi parolas Esperante?

La knabo ekvigliĝis kvazaŭ li aŭdus sian patrolingvon, pri kiu li tiom sopiris, kaj ĝoje respondis:

— Jes, mi parolas Esperante.

— Kia vetero estis hodiaŭ matene? — demandis G. Nikolajevič ne tute konvenan demandon.

La knabo tre atente sekvis rigardon de la homo, observante la movon de liaj lipoj.

— Malbona estis la vetero. Nubiĝis kaj pluis, — aŭdiĝis la frazo, kiu ne estis en la lernolibro de G. Nikolajevič.

Baldaŭ la interparolantoj alvenis la ligna dometon. Sur la pordo verdiĝis granda kvinpinta stelo. En ĝia centro estis skribitaj tri literoj:



Monumento al Nikolaj Kuznecov

“SEU”.

— Kial ni ĝis nun ne estas konataj? — subite rimarkis G. Nikolajevič. — G. N. Besedniĥ, jurkonsilisto. — Li prezentis sin la unua.

— Nikolaj Kuznecov, studento de la agrikultura teknika lernejo. Mi okupiĝis pri Esperanto unu jaron. Nun mi volas daŭrigi.

— Belege! Eniru nian rondeton.

Rapide traflugis oktobro. Nikolaj helpis al Besedniĥ kaj tiu alte estimis sian samideanon kaj konfidis al Nikolaj gvidi konversaciajn lecionojn de Esperanto. Ja li estis okupita pri historiaj kaj lingvistikaj lekcionoj, profunde studante la librojn de la kluba biblioteko aŭ tiujn, kiujn li ricevis el eksterlando.

La rondeto plifortiĝis, la anoj amikiĝis, transformiĝis en solidaran kolektivon, kaj al Nikolaj oni donis varman nomon Nikoŝa.

Traleĝinte la projekton de la statuto de SEU, G. Nikolajevič lumiĝis pri la nova ideo:

— Nikoŝa, estas tempo por ni membriĝi al SEU. Post nia aliĝo ni povos ricevi necesan literaturon, oni agnoskos nin kaj ni havos eblecon konatiĝi ne nur kun rusaj, sed ankaŭ kun eksterlandaj esperantistoj.

— Tamen mi ankoraŭ ne estas 18-jara.

— Ne gravas. Ne ĉio en vivo dependas de aĝo. Mi ĉion aranĝos. Do, skribu deklaron!

G. Nikolajevič neniam prokrastis plenumon de aferoj. Malfrue vespere li skribis rekomendan leteron pri la laboro de Nikolaj Kuznecov en la urba klubo. La leteron li finis per la frazo: “Nikolaj kuniĝas la internacian lingvon kun la solidara ideo de tutmonda laboristaro.”

En la jaro 1927 Nikolaj finis la unuan kurson de la agrikultura teknika lernejo. Li devis forveturi el Tjumeno por ĉiam kaj reveni hejmen pro la morto de sia patro. Li daŭrigis studadon en la arbarkultura teknika lernejo de la urbo Talica.

En la teknika lernejo, kie studis Nikolaj, funkciis rondeto, kies membro li baldaŭ fariĝis. La rondetanoj korespondis kun germanaj esperantistoj. Kuznecov ofte helpis traduki la leterojn.

La prezidanto de la klubo estis ĉeĥo Franc Franceviĉ Javurek, kiu longe vivis en Germanio kaj transloĝiĝis en 1914.

Franc Franceviĉ instruis la germanan lingvon en la sepklasa lernejo, kiun finis Nikolaj, kaj li estis lia malnova konato. Helpe de li Kuznecov perfektigis en ambaŭ lingvoj.

La jaroj estis feliĉaj por Nikolaj. Li ofte renkontiĝis kun siaj geamikoj el Esperanto-kluboj, kune ili aranĝis vesperojn, kantis kantojn, tradukis Esperanten la rusan poezion. Al ĉiuj geklubanoj plaĉis lia traduko de la poemo “Borodino” de Miĥail Lermontov. La originalon de la traduko oni povas vidi en la muzeo de la urbo Talica.

Poste Nikolaj fariĝis nacia heroo. La esperantistoj de uralaj urboj ne forgesas lin. Dum memortagoj, ĉiujare, la 27-an de julio, kiam li naskiĝis, kaj komence de marto, kiam li tragike pereis, ili vizitas liajn muzeojn en Tjumeno, Jekaterinburg kaj Talica, metas florojn al liaj monumentoj. ■

En Esperanto-kurso

TIU ĉi estis malgranda kolektivo el 14 personoj. Ĝi estis la 2-a E-kurso kune funkciigata de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Branĉo de la Ĉina Centra Administra Instituto por Kulturaj Funkciuloj. La kursanoj el diversaj lokoj de Ĉinio okupiĝis pri malsamaj profesioj. Iuj ĵus diplomiĝis el lernejoj kaj aliaj laboris multajn jarojn. Plejparto de ili venis lerni Esperanton mempage.

En septembro 1991 mi ĉeestis la inaŭguron de tiu ĉi E-kurso. Tiam mi konatiĝis kun tiuj kursanoj, poste ofte kontaktiĝis kun ili kaj tiel sciis ilian lernadon. Jen iliaj Esperantaj travivaĵoj:

Hazardo povas ŝanĝi la tutan vivon de homo. S-rino Shi Xueqin havas tian sperton. Tio okazis antaŭ kelkaj jaroj, kiam ŝi estis pli-ol-20-jara. Ŝin trafis malsano kaj ŝi enhospitaliĝis. Ĝuste tiam iu menciis al ŝi Esperanton kaj ŝi komencis lerni ĝin. Post longa tempo Esperanto fariĝis ŝia spirita apogilo kaj ŝia sanstato pliboniĝis tago post tago. Poste, kiam ŝi renkontis homojn scivolemajn al Esperanto, ŝi fervore koniĝis al ili la lingvon. "Pliiĝa fratino" Tu Xiuli estis kon-

vinkita de ŝi kaj eklernis Esperanton.

La kursanoj nomas Tu Xiuli pliigata fratino, ĉar ŝi ne nur estas la plej aĝa el ili, sed ankaŭ zorgas pri aliaj kiel pliigata fratino. Ĉiufoje, kiam mi vizitis ŝin, ŝi montris sin gastama kaj parolema. Nun ŝi komencis kolekti Esperantajn filatelajn laĵojn.

Same kiel la pliigata fratino, fraŭlinoj Zhao Nian kaj Wang Li partoprenis en la lernado post la inaŭguro de la kurso. Ankaŭ Shen Mo, pliigata fratino de Wang Li, lernis en tiu ĉi kurso. Zhao Nian diris al mi, ke antaŭe ŝi lernis la anglan lingvon en tiu ĉi instituto kaj sciis nenion pri Esperanto. Foje ŝi ĉeestis lecionon de la E-kurso kaj interesiĝis pri Esperanto. Sekve ŝi decidis lerni tiun ĉi lingvon.

Inter la 14 kursanoj iuj estis komencantoj, dum aliaj lernis Esperanton de kelkaj jaroj. Xiong Linping venis el la kamparo de Jiangxi-provinco. Liaj patrino kaj edzino ŝpare vivis por subteni lin en la lernado de Esperanto. Li ofte korespondas kun alilandaj esperantistoj. Ankaŭ Cao Xionglin venis el Jiangxi-provinco. En novembro 1989, li okazigis sian ekspozicion de Esperantaj filatelaĵoj en

Nanchang, la ĉefurbo de la provinco. La ekspozicio, kiun li sukcesis aranĝi en mallonga tempo, faris sensacion en la filatelistaro. Por plialtigi sian Esperantan nivelon li forestis de sia gravediĝinta edzino kaj venis al Pekino. Pro tio li tre dankas sian edzinon.

La niveloj de tiuj kursanoj estis malsamaj, kio faris malfacila la instruadon. La kurson gvidis s-roj Li Shijun kaj Liu Fengyi, kiuj havas riĉan sperton en E-instruado. Ili estis severaj al tiuj lernantoj kaj serioza en la instruado. En postlecionaj horoj progresintoj ofte helpis komencantojn en ilia preparo de lecionoj, por ke ili konformigu sin al la instruado. Dum lecionoj ili ofte diskutis varme pri lingvaĵoj.

Krom ĉeesti lecionon, ili ankaŭ partoprenis en postleciona Esperanta aktivado. Ili plurfoje aktivadis kun pekinaj esperantistoj sub la organizado de la ĉefkursanoj Li Xuelian kaj Wang Yanjing. Kiam ili ekskursis al pekinaj vidindaĵoj, kiaj la Somera Palaco, Xiangshan-monto kaj la Granda Muro, ili ĉiam kunportia verdstelan flagon, kaj en tiuj lokoj aŭdiĝis Esperantaj konversacioj kaj kantoj. Post kiam alilokaj esperantistoj venis al

Instruisto Li Shijun donas lecionon.



Post leciono





Kredu vian infanon

MI estis oficvojaĝonta unu semajnon kaj konfidis mian filon Lele al mia emerita patro.

Kiam mi revenis kaj iris al la patro por preni la filon, la patro diris al mi kun kolero kaj seriozeco: "Via filo mensogis, kaj malkonfesis sian eraron." Tion dirante, li montris al mi libron, kaj sur la dorskovrilo skribiĝis "Lele, paĉjo sopiras al vi". Mia patro daŭre plendis: "Via filo skribis tion en mia libro, kaj demandis min, kiu skribis. Mi lasis lin imite reskribi tion kaj trovis, ke ambaŭ skribaĵoj estas tute similaj, tamen li ankoraŭ ne konfesis la eraron. Vi devas esplori la aferon, ke li ne fariĝu mensogema."

Lele revenis de lernejo. Mi rakontis al li, kiel detektivo solvis kazon laŭ skribmaniero, kaj diris: "Ĉies skribmanieroj estas malsamaj. Nun ĉe ni estas problemo pri skribmaniero..."

Je tio mia filo interrompis min kaj sin senkulpiĝis: "Paĉjo, mi scias, ke vi diras pri la skribaĵo sur la libro de la avo. Sed ne mi skribis."

"Sed la skribmaniero similas al la ĉia. Se vi faris tion, petu pardonon de la avo, kaj vi ankoraŭ estas mia bona infano, ĉu bone?"

"Ne, paĉjo, mi ne skribis. Kredu min, paĉjo!"

Kun larmoj en la okuloj mia infano deziregis mian fidon. Kaj en tiu ĉi momento mia patro pli

forte koleriĝis, dirante: "Jen vidu, li denove mensogas al vi. Se vi kredos lin, li do pli kuraĝos mensogi estontece."

Mi vidis, ke ne estas tute problemo morala la fakto, ke infano mensogas. Ofte okazas, ke infano mensogas sub la premo de cirkonstancoj. En la atmosfero de interkompreno, fido kaj indulgemo, infano ne mensogas. Tial mi faris nenian konkludon pri la afero.

Sekvan vesperon mi kaj mia filo gastis ĉe mia plijuna frato. Tiam lia filo Dongdong estis skribanta ĉe tablo. Subite mi volis, ke Lele kaj Dongdong skribu saman vorton, kaj mi komparu iliajn skribaĵojn kun tiu sur la libro de la avo. Post komparo mi trovis, ke la skribmanieroj de Lele kaj Dongdong estas naivaj, similaj unu al la alia, tamen ne tute samaj. Mi certigis, ke Dongdong skribis sur la libro de mia patro. Demandite, li respondis jes. Li vidis Lele sopiri al sia patro kaj skribis tion sur la libro de la avo, por konsoli sian kuzon.

Sur la revenvojo mi haltis, forte premis la manon de la filo kaj laŭdis: "Mia infano, la patro kredas vin. Vi ne mensogis, vi estas honesta infano."

Li levis la kapon kaj ekrigardis min. Li ĵetis sin en mian sinon kaj firme brakumis min. "Paĉjo," li ekploregis. ■

Pekino, ili ofte vizitis kursanojn por interŝanĝi informojn kaj spertojn pri E-movado. Maje ĉi-jare 4 francaj esperantistoj vizitis la kurson kaj interparolis kun ili.

Ili amas Esperanton, ĉiam kaj ĉie protektas Esperanton. Ili rakontis al mi, ke foje ili ekskursis al Xiangshan-monto, iu alilandano veturis kune kun ili. En la aŭtobuso Xiong Linping montris al la alilandano verdstelan insignon, tamen li diris, ke Esperanto estas morta lingvo. Liaj vortoj estigis "publikan indignon", ili montris

faktojn por konvinki al li, ke Esperanto estas utila internacia helpa lingvo. Vidante tiel multajn esperantistojn en la aŭtobuso, la alilandano devis diri, ke li nur ŝercis.

Ili ĉiuj domaĝis la ŝancon lerni la lingvon. Post unujara lernado ilia Esperanta nivelo multe altiĝis. En la oratora konkurso de la 2-a Ĉina Kongreso de Esperanto okazinta en Tangshan januare ĉi-jare, Shi Xueqin kaj Zhao Nian gajnis li nur ŝercis.

Ili ĉiuj domaĝis la ŝancon lerni la lingvon. Post unujara lernado

ilia Esperanta nivelo multe altiĝis. En la oratora konkurso de la 2-a Ĉina Kongreso de Esperanto okazinta en Tangshan januare ĉi-jare, Shi Xueqin kaj Zhao Nian gajnis la unuan kaj duan premiojn respektive.

La E-kurso estis kolektivo de solidareco kaj amikeco. Tiun, kiu renkontis malfacilaĵojn, helpis aliaj kursanoj. Helpi kaj zorgi unu alian estis la spirito de la kurso. Pro ĉio ĉi tio la kurso estis aljuĝita de la instituto kiel avangarda kurso de la lernoĵaro 1991-1992. ■

ESP-NOVAĴOJ

● Okaze de la 6-a datreveno de sia fondiĝo, la Qingdao-a Esperanto-Ligo de Shandong-provinco okazigis de la 23-a ĝis la 30-a de majo Semajnon de Esperanto.

● La 13-an de junio oni komencis fari en Qingdao ŝtonan statuon de Dr. Zamenhof, la unuan en Ĉinio. La statuo estas skulptita el ruĝa granito, alta je 3.5 m, larĝa je 1.8 m kaj dika je 1.5 m, kaj ĝia soklo el bluverda granito. Ambaŭ ŝtonpecoj estas hakitaj en Laoshan-monto. La statuo staros antaŭ la Hotelo "Espero" de la urbo.

● Antaŭ nelonge tri-membra delegacio de la Esperanto-Asocio de Chengde de Hebei-provinco vizitis Litovion, Finnlandon kaj Pollandon. Ili intertraktis kun tieaj esperantistoj kaj Esperantaj organizoj pri interŝanĝo kaj kunlaboro de komerco, turismo kaj kulturo.

● La 14-an de junio la Esperanto-Instituto de Taijiang-distrikto de Fuzhou, Fujian-provinco, okazigis kunvenon por festi la 5-an datrevenon de sia fondiĝo, kiun partoprenis 300 homoj.

● En la Internacia Infana Tago ĉi-jare, en Nanchang, la ĉefurbo de Jiangxi-provinco, inaŭguriĝis ekspozicio de infanaj pentraĵoj, kiun aranĝis la Hejmo "Makaketo" de Infanaj Pentraĵoj kaj Kaligrafiaĵoj de Nanchang kaj la Infana Belarta Lernejo de Safonovo de Rusio. Ĉirkaŭ mil homoj rigardis la ekspozicion en tiu tago.

● La Esperanto-Asocio de Zaozhuang, Shandong-provinco, kaj la departemento de sciencistoj kaj teknikistoj de la urbo kune funkciigis televidan Esperantan kurson ekde la 22-a de junio. La kurso uzas la televidan filmon "La Espero" kiel instruan materialon.

● Okaze de la Tria Internacia Simpozio pri Militarto de Sunzi (fama ĉina antikva milita strategiisto) la Esperanto-Asocio de Linyi-regiono de Shandong-provinco kaj la regiona Poŝtmarka



La Esperanta stratpanelo

Kompanio faris memorkoverton kun vortoj Esperantaj, ĉinaj kaj anglaj.

● Por celebri la 50-jaran jubileon de "Parolado de Mao Zedong en la Kunsido pri Literaturo kaj Arto en Yan'an", la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis en la 23-a de majo memorigan poŝtmarkoserion. La Poŝtmarka Kompanio de Changshu, Jiangsu-provinco, emisiis Esperantan memor-koverton kaj faris memorigan poŝtstampon. Ankaŭ la Poŝtmarka Kompanio de Haikou, Hainan-provinco, faris Esperantan poŝtstampon.

La 5-an kaj 28-an de junio la ministerio emisiis la poŝtmarkoseriojn "La 20-a Datreveno de la



La Esperanta poŝtstampo farita de la Poŝtmarka Kompanio de Haikou

Media Konferenco de UN" kaj "Insektoj". En tiuj du tagoj la Poŝtmarka Kompanio de Haikou uzis Esperantajn poŝtstampojn.

La kvar poŝtstampojn projektis veterana ĉina esperantisto Zhang Linrui.

● Okazos de la 4-a ĝis la 6-a de decembro 1992 la 40-a Kultura Semajnfino de la Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL) en Homburgo de Germanio. Funkcios enkonduka kurso por komencantoj, konversaciaj kaj legaj ekzercoj, literatura kurso,

seminario por spertuloj ktp. Ukrajna esperantisto Eugeno prelegos pri "Esperanto en la teritorio de la iama Sovetunio". Nederlanda harpistino Saskia faros muzikan vesperon. La adreso de SEL: Sarlanda Esperanto-Ligo, Querstr. 11, D-6607 Quierschied, Germanio.

● Franca esperantisto Raymond Boré trovis belegan stratpanelon "Strato Esperanto" en granda hispana urbo BILBAO. Tio estas unu el la ZEO-j. (ZEO estas akronimo de Zamenhof-Esperanto-Objekto).

● La Kuba Esperanto-Asocio partoprenis la Internacian Konferencon kaj Lingvo-Foiron EX-POLINGUA HAVANO 92 inter la 23-a kaj 26-a de aprilo ĉi-jare en Kubo. La konferencon partoprenis lingvistoj, profesoroj, tradukistoj kaj aliaj fakuloj pri lingvoj venintaj el diversaj landoj de Ameriko, Eŭropo kaj Azio. KEA organizis preleg-serion pri la jenaj temoj: Propedeŭtika valoro de Esperanto; historio de Esperanto en Latinameriko; komunika rolo de Esperanto kaj ties kulturo. Ili havis standon, kie oni povis ĝui videofilmojn, muzikon, ekspozicion pri literaturo kaj lernolibroj, kio kune kun la prelegoj allogis la partoprenantojn.

● La 28-an de majo 1992 kunvenis en Parizo LA AMIKOJ DE L' AKADEMIO kaj ili efektivigis la nombradon por la balotado de l' membroj. Protokolis s-ro Francis LANZ, membro de l' asocia konsilio. Voĉdonis 29 akademianoj. S-ro Li Shijun de Ĉinio ricevis 28 voĉojn kaj okupas la unuan lokon. Jen la aliaj: Erich Krause, Carlo Minnaja, Humphrey Tonkin (27 voĉoj); Probal Daŝgupto, Juan Regulo Perez, Boris Kolker (26 voĉoj) ktp.

DUM longa tempo antaŭ tiu jaro Tang Yushan estis ordinara kamparano ne societema, nek elmontriĝema. Li iris al kamplaboro kune kun la samvilaĝanoj kaj hejmeniris kun ili. Li manĝis kaĉon el malde likata bovlo, kian uzis ĉiuj samvilaĝanoj. Li neniam atendis ŝanĝigon de la vegeta vivo. En tiu jaro hazarda ŝanco ondigos lian vivon.

Tiujare li aĝis 60 jarojn.

La provinca registaro decidis aranĝi kulturalan festivalon "Prin-tempo de Muziko" kaj postulis, ke la diversaj lokoj de la provinco okazigu konkurson kaj elektu la plej bonajn programerojn por la tutprovinca konkurso. La decido estis transdonita pere de la registaroj de diversaj niveloj kaj fine atingis la registaron de ŝjang-o (ŝjang-o estas administra distrikto aŭ subdistrikto en la ĉinaj gubernioj). Sekve laborantoj de la kultura stacio de la ŝjang-o venis al Tang Yushan.

En la vilaĝo de Tang Yushan estis la sidejo de la ŝjang-a registaro, tial li ofte renkontis la registarajn oficistojn kaj salutis ilin. Tamen estis la unua fojo por li, ke oficistoj de la kultura stacio vizitis lin en lia hejmo. Tang Yushan estis surprizita de la neatendita vizito. Li haste leviĝis kaj salutis ilin, dirante: "Ho, kiel vi estas tiel liberaj kaj havas tempon por veni al mi?"

"Sen urĝa afero oni ne venas ĉi tien," senceremonie respondis la venintoj, kvazaŭ ili estus liaj intimaj amikoj. Ili sidiĝis kontraŭ li kaj montris al li la paperon svingante ĝin: "Bonvolu legi ĉi tiun."

Tang Yushan transprenis ĝin. Sed li tuj falis en konsternigon post la lego: "Ĉu mi taŭgas por tio?"

"Vi taŭgas," iom ridetis la gastoj. "Vi ŝatas kanti kaj vi kantas bone, do vi estu reprezentanto de nia ŝjang-o."

Tang Yushan bone kantas. Tion ĉiuj vilaĝanoj scias. Lia voĉo estas tre bona, ne akuta, nek obtuza, sed raŭketa. Li kantas en libera tempo aŭ kamplaborante. Lia kantado es-

Reĝo de kantado

(Novelo)

de GUO CUN

tas kvazaŭ ŝvebanta nubo aŭ agrabla zefiro.

Sed lia edzino malaprobis: "Kial kanti? Ĉu vi ne sentas vin laca post taga laboro?"

Tang Yushan kontraŭdiris: "Ĉu ni vivas nur por laboro? Ĉu ni ne rajtas ion fari krom kamplaboro?"

Sed kantado en hejmo aŭ sur kampo estas tute malsama ol kantado sur scenejo. Tang Yushan rigardis varieteon en la teatro de la gubernio. Kiel vasta scenejo, kiel brila ilumino, kiel granda spektantaro... Ĉe tio li ektimis kaj demandis kun konsterniĝo: "Mi reprezentos nian ŝjang-on?"

"Jes," diris la gastoj.

"Ne ŝercu. Mi, maljuna kaj turpa, ridindigos nian vilaĝon."

"Ne, absolute ne," laŭtiĝis la voĉo de laboranto de la kultura stacio. "Ĝuste vi povas reprezenti la amason. Cetere, ĉiuj aliaj lokoj sendos junulojn, kaj nur nia ŝjang-o sendos maljunan konkurstanton. Eble tio ja estos nia supereco."

"Tamen miaj kantoj estas senescepte malmalmodernaj, kaj se mi malsukcesos..." obstinis Tang Yushan.

"Ho vi," diris kun veo la alia alveninto. "Kiel obstina vi estas! Kiu diras, ke vi malsukcesos?"

Aldonis la unua: "Kaj vi povas adapti novan tekston al la malnova melodio."

Efektive Tang Yushan estis volonta kanti, kvankam li neniam faris tion sur scenejo antaŭ granda publiko. Insista persvado de la kulturaj laborantoj ne permesis al li rifuzi kaj li konsentis dubsence.

Tang Yushan estis konscienca kaj fidela al sia promeso. Komprenante, ke malnova teksto ne konformas al la aktualaj situacioj, li komencis verki novajn tekstojn. Li ĉesis iri al kamplaboro kaj fermis sin en la hejmo. Li komplete absorbiĝis en la verkado. Li provkantis, reviziis kaj denove provis. Lia edzino tre intencis verŝi sur lin plendon kontraŭ lia troa absorbiĝo, sed ŝi fine detenis sin de kolero.

En duonmonato Tang Yushan verkis du novajn tekstojn "Miela estas la vivo de kamparanoj" kaj "Adiaŭ, mia kara". La dua kanto rakontas, ke viro iras aliloken por fari varproduktadon, kaj lia edzino amoplene adiaŭas lin, laŭdante la novajn bonajn politikojn kaj kuraĝigante lin. La temo estas moderna dum la melodio antikveca.

En la tago por prezentado en la gubernia urbo Tang Yushan ellitiĝis frue. Fakte, antaŭ longe li jam pretiĝis por si novajn vestojn kaj razis sin antaŭvespere. La tekstoj estis verkitaj de li mem kaj neforgeseblaj. Tamen li ellitiĝis frue kaj rondiris en la korto.

"Ĉu vi iras al amrendevuo? Por kio vi streĉiĝas?" la edzino ridis je li.

"Tute malsama afero," ridetis Tang Yushan.

Lia hejmo distancis de la gubernia urbo nur kelke da kilometroj, por tiu distanco lia biciklado estis nur duonhora.

La kantokonkurso okazis en la halo de la gubernia registaro. La reprezentantoj de ĉiuj ŝjang-oj laŭvice kantis sur la scenejo. Tang Yushan trankviliĝis aŭskultinte la kantadon de la unuaj konkurstantoj. Ili ĉiuj kantis ne bone, malgraŭ ke ili estis belaj kaj portis belajn vestojn. Ili fariĝis kvazaŭ pupoj

sur la scenejo. Tang Yushan sciis, ke ili falis en konsternigon. Li atentigis sin: "Ne konsterniĝu, prenu la scenejon kiel kampon."

Sed fakte li sentis konsternigon starante sur la scenejo. Apenaŭ li iris el post la kuliso, li aŭdis fortan kaj entuziasman aplaŭdadon. Li ne sciis, pro kio oni forte aplaŭdis. "Ĉu ili aplaŭdas por aŭ kontraŭ mia aĝo kaj la vesto?" Li aŭdis zumadon en la cerbo kaj ne povis klare vidi. Sed li baldaŭ kvietigis sin. Li ne povis returni sin al la postscenejo. Li kuraĝigis sin: "Ĉi tie estas kampo."

"Mi estas kamparano sesdekjara. Mi ŝatas kanti. Hodiaŭ mi kantas kanton verkitan de mi mem..."

Li liberigis sin de timo kaj sin prezentis, ĉirkaŭrigardante la grandan spektantaron.

Denove leviĝis aplaŭdado.

Tiam Tang Yushan komprenis la signifon de la aplaŭdado.

Li kantis, ludante muzikilon. Li

brile sukcesis. Lia kantado estis plurfoje interrompita de aplaŭdado. Tang Yushan komplete absorbiĝis en sia arto forgesante la scenejon, la aŭskultantaron kaj ankaŭ sin mem. Lia kantado estis tiel agrabla, kiel lirlanta rivereto kaj delikata zefiro karesanta salikovergojn. La teksto estis tre populara, la kantado estis simila al familiara konversacio, tial la aŭskultantoj forte interesigis pri lia kantado kaj adresis al li pli varman kaj pli longan aplaŭdadon.

Post la kuliso al li renkonte iris direktoro de la kultura domo de la gubernio. Li varme gratulis Tang Yushan premante al li la manojn: "Kamarado, vi bone kantis, tre bone."

Tang Yushan sentis kontentigon pro la sukceso, tamen tion li ne elmontris. "Mia kanto estas plej ordinara popularaĵo," li diris.

Sed la direktoro diris serioze: "Ne humiliĝu. Tio ja estas nia propraĵo, ni devas disvolvi nian nacian kulturon."

Post sukcesa prezentaĵo en la gubernio Tang Yushan estis sendita al konkurso de pli alta nivelo kaj fine al la konkurso de provinca nivelo. En la provinca konkurso li akiris brilan pokalon de speciala premio kaj ruĝan ateston pri la gajno.

Tang Yushan tre kontentiĝis. Li vidis tute novan mondon ekster la flava tero de la hejmvilaĝo.

Ŝajne li ĵus konis sin mem kaj komencis ĝui la feliĉon de la vivo, unuafoje en la pasintaj dekoj da jaroj.

Tiam la superaj instancoj tre akcentis kulturen laboron de la popolamasoj. Kaj foje al la gubernio venis gvidanto de supera instanco pri la kulturo kaj edukado. Li montris grandan intereson pri Tang Yushan kaj petis venigi lin.

Tang Yushan estis trovita sur kampo. Li estis irigacianta la tritikan kampon. Liaj krurumoj kaj la manoj estis makulitaj de koto. Malgraŭ tio la gvidanto varme manpremis al li kaj konversaciis kun li. En la komenco Tang Yushan sentis ĝeniĝon kaj ĝentile respondis la demandojn. Sed kiam oni petis lin kanti, li sentis trankviliĝon.

Li kantis la du kantojn, kiujn li mem verkis. La gvidanto komentariis pri lia kantado kaj demandis pri tio kaj tio. Tang Yushan diris al li pri la mizero en la pasinteco kaj la nuna bonhaveco de la vivo, pri grena provizado kaj ankaŭ pri ĉiutagaj manĝaĵoj.

"Ĉu vi kantis, kiam vi estis malriĉa?" demandis gvidanto.

"Iam mi kantis, tamen la vivon ĝenadis malagrablaĵoj, kaj la kantado ne estis tiel gaja," respondis Tang Yushan.

"Kiel nun?"

"Nun ni estas kontentaj."

La gvidanto kun ĝojo foriris.

Post kelke da tagoj oni informis Tang Yushan, ke la provinca televido intencis filmi gajan familion de kamparano por dissendi en la Printempa Festo, kaj post zorgema pripensado oni decidis filmi la familion de Tang Yushan.

Al la vilaĝo venis tri homoj de la provinca televido: raportistino, sonregistristino kaj filmisto. Unue ili kunsidis kun Tang Yushan kaj poste petis lin kanti. Ili estis kontentaj pri lia kantado, sed ili preferis, ke kune kantu liaj familianoj.

Silentis Tang Yushan.



“Ĉu via nepo kantas?” demandis la apudestanta direktoro de la kultura domo de la gubernio.

“Li lernis kanti en la lernejo, sed la voĉo ne estas bona.”

“Tio ne gravas,” diris laboranto de la televido.

“Kaj viaj filo kaj bofilino?” refoje demandis la direktoro.

“Ne, ili ne ŝatas kanti,” respondis Tang Yushan.

Fakte liaj filo kaj bofilino bone kantas, tion klare scias Tang Yushan. Sed li jam sentis ilian malkontenton kontraŭ lia kantado kaj skrupulis ligi ilin al la afero.

“Estos bone, se via edzino kantas kune kun vi,” proponis la raportistino de la televido.

“Ŝi neniam kantis. Mi ne scias, ĉu ŝi scipovas kanti.” hezite diris Tang Yushan.

“Persvadu ŝin,” konsilis la raportistino.

Hejme, ĉe la enlitigo li diris la aferon al la edzino, sed antaŭ ol li finis, la edzino ekkriis: “Via sola freneziĝo ne sufiĉas? Vi volas, ke

la tuta familio freneziĝu same kiel vi?”

“Ne tiel laŭte. Ne lasu la infanojn aŭdi,” diris Tang Yushan puŝetante la edzinon.

“Mi ne timas, ke ili aŭdos. Mi ne kantos.”

“Nenia hontindaĵo estas. La kantado ne estas ŝtelo nek friponado.”

“Vi povas persisti, tamen mi ne kantos. En tiuj tagoj mi iros al parencoj.” Tion dirinte, ŝi sin turnis for de Tang Yushan.


“Se vi ne konsentos, oni ne filmos. Ĉu tio ne hontigos min?” daŭre admonis Tang Yushan kun kompatinda mildeco. Li turnis la edzinon al si kaj kisis ŝin.

“Vi deziras gloron, sed mi hontas, ke mi, pli-ol-60-jara maljunulino, kantas. Ĉu mi estas freneza aŭ fola...” Anstataŭ rekompenci lian kison, ŝi daŭre murmuradis malkontente. Sed aŭskultante, Tang Yushan sentis varmon sur sia brako. Tio estis larmoj de la edzino. Tio mesaĝis al li, ke ŝi konsentis.

Tang Yushan kaj la edzino sin ekzercis en dueto “Novjara festo post riĉa rikolto”, kiun Tang Yushan verkis.

La filmo estis nur dekkelkminuta. Ĝi konsistis el kelke da scenaroj. La unua prezentis kolektadon de popolkantoj de Tang Yushan, la dua kantadon de Tang Yushan kaj liaj familianoj, la tria kantadon de Tang Yushan en la vilaĝo kaj sur la kampo, kaj la aliaj lian laboradon. Kvankam la filmo estis mallonga, tamen la filmado daŭris plurajn tagojn. Post la finiĝo de la filmado Tang Yushan kaj liaj familianoj sentis lacecon.

En la Printempa Festo la provinca televido dissendis la filmon. Tiutage la tuta familio de Tang Yushan televidis. Oni bone filmis, la homoj kaj la korto estis multe pli belaj ol la efektivaj. La tuta familio dronis en granda ĝojo escepte de la edzino de Tang Yushan. Ŝi grumblis: “Por kio vi tiel energie kantas? Ĉu por plezuro aŭ por turmento?” ■



Kora funebro pri la forpaso de Ludoviko Enizan

Ludoviko Enizan (1917-1992), prezidanto de Esperanto-grupo de Rueil-Malmaison de Francio, membro de SAT kaj aktivulo de E-movado, forpasis la 1-an de julio 1992 en Suresnes.

Ludoviko Enizan estis entuziasma esperantisto, kiu dediĉis sian tutan energion al la Esperantomovado. Li esperis, ke la Internacia Lingvo venkos kaj ke ĉiuj popoloj kaj registaroj akceptos kaj praktikos ĝin.

Li estis bona amiko de la ĉinaj esperantistoj. Kiel multjara fidela leganto de EPC, li tenis tre intimajn rilatojn kun nia redakcio, subtenante ĝin per abonigo kaj kontribuajoj. Li havis multajn korespondantojn en Ĉinio kaj ĝuis ilian altan respekton pro sia fervoro kaj helpemo. Nin tre doloras lia forpaso. Ni karmemoros lin. Pacon al lia animo.

Ĉina Esperanto-Ligo
Redakcio de “El Popola Ĉinio”

PROSPERAJ URBETAJ ENTREPRENOJ EN WUXI-GUBERNIO

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de LING YOUJUAN



Produktaĵoj de la Xuelang-a Laminejo transportotaj

LA urbo Wuxi estas riĉa ĉe la malsupra Yangzi-rivero. Antaŭe ĝi estis fama ne nur pro sia agrikulturo, sed ankaŭ pro siaj tekstila kaj manĝaj-prilabora industrioj kaj tradicia metiarto pri argilaj homfiguroj.

Kvankam ankoraŭ ekzistas tiuj tradiciaj industrioj kaj metiarto de Wuxi, tamen pli avangardaj estas ĝiaj modernaj urbetaj entreprenoj. Ekzemple, en la somero de 1991 eksterordinara superakvo, kia ne vidiĝis en la pasintaj cent jaroj, perdis 1.064 miliardojn da juanoj (ĉ. 5.5 juanoj = unu usona dolaro) al Wuxi-gubernio kun 1.084 milionoj da



En laborejo de la Taihui-a Trikejo

S-ino Yang Xiangdi (meze) konigas produktaĵon al gasto de Belorusio (dekstre).



loĝantoj, kiu apartenas al la urbo Wuxi. Tamen la totala produktovaloro de la urbetaj entreprenoj de la gubernio atingis 15.054 miliardojn da juanoj. Antaŭ 14 jaroj la pokapa jara enspezo de la lokaj kamparanoj estis nur ĉ. 100 juanoj, sed nun ĝi jam atingis 1 697 juanojn. En iuj urbetoj kun prosperaj entreprenoj la kamparanoj komencis strebi al pli alta nivelo.

KAMPARANAJ URBOJ ĴUS APERINTAJ

Same kiel la proksimaj regionoj Suzhou, Jiangyin kaj Changzhou, Wuxi de Jiangsu-provinco estas unu el la ĉinaj regionoj de plej alta agrikultura produkta nivelo. Tamen en la loko multaj estas la loĝantoj kaj malmultaj la kampoj, kaj la pokapa areo de agroj eĉ ne atingis 0.05 hektaron. Kiam oni ekpraktikis la laŭkontraktan produktan sistemon en la kamparo antaŭ dekkelkaj jaroj, ĉiam leviĝis la produkta efiko, tiel ke la limigitaj kampoj ne plu povis enteni la kamparanojn kun alta labor-aktiveco. Kien iru la granda superflua laborforto?

Tiam estis du malnovaj vojoj: Unue, same kiel siaj antaŭuloj la kamparanoj laboru sur la kampoj por vivi monotonan kaj malfacilan vivon. Due, ili torentu en grandajn aŭ mezgrandajn urbojn, kio povas kaŭzi tromultecon de la loĝantaro en tiuj urboj kaj plie grandigos la diferencojn inter la urboj kaj kamparo. Sed la gubernio Wuxi ne sekvis tiujn du vojojn. Same kiel multaj aliaj lokoj de Ĉinio, ĝi elektis vojon disvolvi urbetajn entreprenojn, por ke la kamparanoj okupiĝu kaj pri agrikulturo kaj pri industrio en sia hejmloko, kio kaj havigis al ili laboron kaj akumulis fonduson por la agrikultura modernigo.

Por disvolvi tiujn urbetajn entreprenojn, oni dependas ne de investo de la ŝtato, sed de mono de kamparanoj (inkl. parton de la mono kolektive akumulita) kaj ilia memstara mastrumado.

Feliĉe, en la gubernio Wuxi mi havis ŝancon viziti dek kamparanajn urbojn ĵus aperintajn, ekz. Huazhuang kaj Xuelang. Kvankam mi restis tie tre

mallonge, tamen ĉie mi vidis fabrikojn, kies laboristoj troveblas en ĉiuj familioj.

La urbeto Huazhuang kun areo de 37 kvadrataj kilometroj, ĉe Taihu-lago en sudo de antikve produktas rizon kaj bredas silkraŭpojn. Tamen tio longtempe ne riĉigis la lokajn kamparanojn. Post kiam oni starigis la urbetajn entreprenojn antaŭ dekkelkaj jaroj, granda ŝanĝiĝo okazis en tiu loko. En 1991 la totala produktovaloro de la urbetaj entreprenoj estis 548 milionoj da juanoj, 30-oble pli multe ol tiu en 1978, kaj la totala produktovaloro de agrikulturo estis 29.14 milionoj da juanoj, 3.2-oble pli multe ol tiu en 1978.

Nun oni starigis 327 urbetajn kaj vilaĝajn fabrikojn metalurgiajn, maŝinajn, kemiindustriajn, elektronikajn, tekstilajn kaj konstrumaterialajn, kun pli ol 1 200 specoj da produktaĵoj. Interalie, aperis aro da ĉefaj entreprenoj kun povo de konkurenco en la internacia merkato kaj 13 famaj produktaĵoj, ricevitaj honoran titolon de la ŝtato, provinco aŭ urbo.

Tiutage mi vizitis preskaŭ ĉiujn ĉefajn stratojn de Huazhuang. Ambaŭflanke de la asfaltitaj stratoj kreskas arboj, sidas fabrikoj, vendejoj, hospitaloj, restoracioj, balejoj, kafejoj, lernejoj kaj kinejoj. Aŭtomataj program-regaj telefonoj troviĝas preskaŭ en ĉiuj fabrikoj kaj institucioj, per kiuj oni povas komunikiĝi kun aliaj landoj kaj aliaj lokoj de Ĉinio. La hoteloj luksaj kaj neluksaj staras ĉe stratoj kaj riveroj. Plejparto de la kamparanoj adiaŭis la antaŭan simplan kaj monotonan vivmedion kaj enloĝiĝis en novaj etaĝdomoj. La mode vestitaj kamparanoj sur stratoj povas esti komparataj kun urbanoj.

Iu sociologo diris al mi, ke post la apero de kamparanaj urboj iuj kamparanoj ne plu serĉas vivrimedojn en grandaj urboj kaj iuj urbanoj volonte forlasas sian urbon por fariĝi kamparaj loĝantoj.

HELPANTO EN GRANDA KONKURENCO

S-ro Zhou Yaoting estas estro de la Taihu-a Trikejo en la urbeto Gangxia. Je la unua vido al lia sunbruna vizaĝo mi konjektis, ke li estis honesta

En la urbeto Huazhuang



En ombrela fabriko



kamparano, kvankam li portis bone gladitan eŭropan kostumon. Tio ne estas grava, tamen mi volis informiĝi, kiel li starigis kaj disvolvis en la pasintaj 9 jaroj modernan urbetan entreprenon surbaze de malnova domo kaj ok tre malnovaj maŝinoj, kies jara produktovaloro superis 100 milionojn da juanoj. En la akceptejo tiu kamparano-entreprenisto rakontis al mi pri la historio de la trikejo.

En la frua periodo de disvolviĝo de urbetaj entreprenoj oni rigardis ilin kiel helpantojn de la grandaj kaj mezgrandaj ŝtataj entreprenoj kaj tiaj malgrandaj entreprenoj estas facile mastrumeblaj. Tamen s-ro Zhou Yaoting, kiu travivis sennombrajn malfacilojn, resumis, ke ankaŭ la malgrandaj entreprenoj devas disvolviĝi kaj elporti provon de konkurenco en la internacia merkato. Alie, tiuj entreprenoj, longtempe ludantaj la rolon de helpanto, ne povas disvolvi sian produktadon nek konkurenci en la internacia merkato, tiel ke ili perdas sian vivopovon. Tial s-ro Zhou Yaoting ŝanĝis malnovajn ekipaĵojn, levis la kvaliton de la produktaĵoj kaj vigligis la entreprenadon por kontentigi la postulon de la internacia merkato pri pomalgranda produktado, multigo de specoj, novigo de formoj kaj rapidigo de liverado, tiel ke la produktaĵoj de tiu trikejo havis grandan debiton en la merkato en- kaj eksterlanda.

Pro sia malriĉeco la trikejo devis prunti monon por disvolvi la produktadon. De post 1984 la trikejo sinsekve pruntis monon, dufoje novigis siajn ekipaĵojn, konstruis kaj translokis la laborejojn. En 1990, dank' al la kuninvestado kun alilandaj komercistoj, la trikejo fondis la Xinli-an Limigitan Vestokompanion en Wuxi, importis alilandajn avangardajn ekipaĵojn por kolorigo, glado kaj komputila brodado, kiuj formis labor-linion de teksado, tinkurado, presado, tajlado, vestofarado kaj vestopakado. Samtempe la trikejestro oftigis kunlaboron kun scienc-esploraj institucioj kaj senĉese plibonigis la produktadon, kio grandmezure kreskigis la profiton de la trikejo en la pasintaj naŭ jaroj.

Same kiel aliaj urbetaj entreprenoj de Wuxi-gubernio, s-ro Zhou Yaoting ellaboris serion da efikaj administraj sistemoj. Li estas rigora al siaj laboristoj kaj oficistoj, kiuj ricevas salajron laŭ produktaĵaj kvalito, kvanto kaj jara profito, kio montras la principon "ĉiu akiras laŭ sia laboro".

Dank' al la bona administrado la jara produktovaloro superis 100 milionojn da juanoj. Kiel aliaj naŭ profitodonaj entreprenoj la trikejo fariĝis unu el la ĉefaj fortoj daŭre disvolvantaj la urbetajn entreprenojn de Wuxi-gubernio.

KURAĜA VIRINO

Mi vizitis la Jiangnan-an Industrian kaj Komercon Ledajan Fabrikon de la urbeto Qianqiao. Ĝiaj laboristoj laŭdis, ke s-ino Yang Xiangdi, ĝia estrino,

estas malproksimvida kaj kuraĝa. Kiam ŝi estis transpostenigita en tiun fabrikon en 1979, ŝi havis nur 30 laboristojn, tri malnovajn domojn kaj iom pli ol 3 000 juanojn. Poste la fabriko fariĝis granda pro la rapida disvolviĝo kaj estis elektita kiel entreprenostelo de la gubernio. Pro tio nemalmultaj estis memkontentaj pri la malgranda riĉeco. S-ino Yang Xiangdi tamen trovis, ke ne estas tre bonvenaj al la enlanda merkato la ledaj monuoj, ĉefaj produktaĵoj de la fabriko, kaj ili povas havi debiton nur en la internacia merkato. Sed multaj laboristoj timis, ke la fabriko suferos perdon, ĉar ili ne konis la internacian komercan situacion kaj neniam negocis kun alilandanoj. S-ino Yang Xiangdi diris al la laboristoj: "Ni devas lerni kaj fari nekonatajn aferojn. En akvo ni povas lerni naĝi." Ŝi gvidis la laboristojn por krei kanalon de ekstera komerco, plibonigis la investan medion, anstataŭigis la porkoledajn monuojn per la luksaj ŝafledaj monuoj kaj vendis ĉiujn produktaĵojn al pli ol 20 landoj kaj regionoj, kiel Usono, Britio, Germanio, Japanio kaj Hongkong. Ĝis la fino de 1991 la fabriko jam havis 710 laboristojn, kaj ĝia jara profito el eksporto estas pli ol 3 milionoj da usonaj dolaroj. Kaj baldaŭ finkonstruiĝos la laborejo de ledaj zonoj, por kiu investis la fabriko kaj alilanda komercisto.

Tiu fabriko estas miniaturo de la urbetaj entreprenoj de Wuxi por ekstera komerco.

En la norda antaŭurbo de la gubernio sidas la antikva urbeto Chang'an kun apenaŭ 30 000 loĝantoj. En la lastaj jaroj la totala jara profito de ĝiaj 25 novaj urbetaj entreprenoj por ekstera komerco superis 10 milionojn da usonaj dolaroj kaj tiuj entreprenoj estis titolitaj de la Ĉina Ministerio de Ekonomio kaj Komerco "entreprenoj de komerca, industria kaj agrikultura eksporto". S-ro Sun Kecheng, estro de la Chang'an-a Ĝenerala Industria kaj Komerca Tekstilejo en Wuxi, diris al mi, ke li ne kontentas pri entreprenado en sia hejmloko, por kiu investis ĉinoj kaj alilandaj komercistoj. Li ĵus revenis post vizito de kelkaj landoj de Norda Ameriko kaj sin preparis por fondi entreprenojn en aliaj landoj.

Kvankam rapide disvolviĝas la urbetaj entreprenoj de Wuxi-gubernio, tamen la monda industria strukturo, gubernia gvidanto Yu Jiashu diris, defias la ĉinajn urbetajn entreprenojn. La evoluintaj landoj senĉese aplikas altan teknikon por fari siajn tradiciajn produktaĵojn, kio reduktos la avantaĝon de laborfortoj de la ĉinaj urbetaj entreprenoj. Aliflanke, la strukturo de eksportaĵoj de novaj industriaj landoj estas multe simila al tiu de la ĉinaj urbetaj entreprenoj, tial okazos granda konkurenco en merkato de eksportaĵoj kaj altiro de eksterlanda investo. Kontraŭ la nova situacio la ĉinaj entreprenistoj cerbumas pri rimedoj por pluaparte disvolvi siajn urbetajn entreprenojn. ■



Sun Wukong ribelanta kontraŭ la Ĉiela Palaco


En mita mondo

— Pri la palaco “Pilgrimado al la Okcidento” en Pekino

Fotoj de LIU SIGONG
Teksto de LI QIANG

Ŝakjamunio, bodisatvoj kaj arhatoj en la Tondra Templo





Xuanzang kaj liaj disĉiploj pilgrimantaj al la Okcidento

“Pilgrimado al la Okcidento” estas mita romano de Ĉinio en Ming-dinastio (1368-1644), kiu plenas de magiaĵoj, strangaĵoj kaj humuraĵoj. La Simio-reĝo Sun Wukong, heroo de la romano, estas konata de ĉiuj ĉinaj familioj kaj ŝatata de ĉiuj ĉinoj, ĉu junaj

ĉu maljunaj. Li estis naskita de ŝtono kaj reĝo de simioj en la Akvokurtena Kaverno sur la Monto de Floroj kaj Fruktoj. Poste li lernis de aliaj kaj posedis la kapablon fari 72 transformiĝojn kaj salti dekmilojn da kilometroj per unu transkapiĝo. Li

estis neniam subigebla. Li ribelis kontraŭ la Palaco de Drako-reĝo kaj perforte pruntis de la Drako-reĝo de la Orienta Maro magian madzon kun oraj ringoj, kiu povas bridi la maron. Li prenis ĝin kiel armilon. Li tumultis kontraŭ la Infero kaj forstrekis sian nomon

En la budholando



Sun Wukong



de la listo de mortokondamnitaj ĉe la Dio de la Infero. Li ribelis kontraŭ la Ĉiela Palaco, kaj la Ĉiela Reĝo kaj ĉielaj generaloj povis fari nenion kontraŭ li.

La Simio-reĝo trompote malvenkis en la ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco, kaj per sia magia povo Ŝakjamunio premis lin sub la monto Wuxing por 500 jaroj. Kiam Xuanzang, fama bonzo de Tang-dinastio (618-907), pilgrimis okcidenten por peti sutrojn, li savis la Simio-reĝon. Ĉi tiu fariĝis lia unua disĉiplo kaj ricevis la nomon Sun Wukong. Survoje li sagace, kuraĝe kaj nesubigeble batalis kontraŭ ĉiaj demonoj kaj monstroj. Helpate de la Porko Bajie kaj la Bonzo Sha, la dua kaj tria disĉiploj de Xuanzang, li venkis 81 malfacilaĵojn. Fine sub lia protekto Xuanzang alvenis al la budholando kaj revenis kun sutroj.

La palaco "Pilgrimado al la Okcidento" konstruita laŭ popularaj intrigoj de la romano sidas en la okcidenta parto de la Pekina Zoologia Ĝardeno. Ĝi konsistas el 8 eksponejoj kun 30 vidindaĵoj, 250 artefaritaj homoj kaj 8 freskoj. En la palaco, kie regas komputiloj kaj akustika kaj optika teknikoj, oni sentas sin kvazaŭ en mita mondo kalejdoskopa.

Kun homfluo mi eniris en la palacon kaj eksentis malvarman blovon. La unua vidindaĵo montras la Akvokurtenan Kavernon. En la kaverno la Simio-reĝo sidas sur estrado kaj la simioj petole ludas. Sur la Monto de Floroj kaj Fruktoj regas eksterordinara gaĵeco.

Laŭ la koridoro mi venis al la kristala "marfundo". Mi vidis, ke la Simio-reĝo, regata per komputilo, turnas la madzon, kiu eligas oran lumringon, ke la Drako-reĝo terurigis kun la kapo forte tremanta kaj la Ĉefministro Testudo streĉis sian kolon en paniko.

Estis mallume survoje al la Infero kaj foj-foje aŭdigis ĝemado de turmentatoj kaj kriadado de demonoj kaj monstroj. Tra aperturo



La imperiestro de Tang-dinastio adiaŭanta Xuanzang

mi trovis, ke la Simio-reĝo tumultas kontraŭ la Infero.

Sub la volbo kun 25-metra diametro la homfiguroj kaj freskoj vidigas la scenon, ke la Simio-reĝo ribelas kontraŭ la Ĉiela Palaco. Kun la madzo en la manoj li staras sur kolono alta 11 m kaj batalas obstine kontraŭ ĉielaj generaloj kaj soldatoj.

Trairinte la rondan salonon, mi vidis la vicaron de la imperiestro kaj aliaj korteganoj de Tang-dinastio, kiuj adiaŭis Xuanzang antaŭ lia pilgrimado okcidenten por peti sutrojn. Antaŭ ni estis la monto Wuxing, la vilaĝo Gaolao kaj la rivero Liusha, kie Xuanzang akceptis la Simio-reĝon, la Porkon Bajie kaj la Bonzon Sha respektive kiel siajn disĉiplojn. Plej ridindas, ke la Porko Bajie portas edzinon sur la dorso. Ekzaltite, Bajie ne rekonis en ŝi la transformiĝintan Sun Wukong, kiu de tempo al tempo levis sian vualon por montri sian propran vizaĝon. Ĉe tio ĉiuj rigardantoj ĝuis la spritaĵon sub la muziko.

Survoje mi vidis ankaŭ jenajn scenojn: Sun Wukong brave batalis kontraŭ arogantaj kaj feroĉaj

demonoj kaj monstroj, venkis la Blankan Skeleto-spiriton, Maljunan Monstron de Lishan-monto, Araneo-spiriton, Ruĝan Infanon, Bovo-reĝon, Reĝidinon Fera Ventumilo, Orkornan Reĝon, Argentkornan Reĝon, Blankan Elefanton, Bluan Leonon kaj Oran Vulturon kaj alvenis al la budholando. La granda halo de la Tondra Templo, kie estas Ŝakjamunio, estas konstruita en hinda stilo. Meze de la halo sidas Ŝakjamunio kaj ambaŭflanke staras bodisatvoj kaj arhatoj. Ili atendas la sutropetantojn. En la halo ŝvebas incensa fumo kaj agrabla muziko, kio montras la majestecon kaj sanktecon de la budholando.


En la salono ĉe la elirejo oni povas ĝui la scenon, ke Xuanzang, Sun Wukong kaj aliaj du revenas al Ĉinio kun la sutroj, en kiu la aero estas freŝa kaj la taglumo intensa. Tie la vizitantoj ricevas la impreson reveni de mita mondo al la reala.

Mi informiĝis de laboranto de la palaco, ke en la pasinta unu monato post sia inaŭguriĝo la palaco akceptis multajn ĉinajn kaj alilandajn turistojn. ■

SUR STRATOJ

Floroj sur la stratoj

Teksto kaj fotoj de LING YOUJUAN



Bona loko por legado

Matena korpo-ekzercado en promenejo



Same kiel aero, maro, teĝo, monto kaj rivero, floroj estas malavara donaco de la naturo al la homaro. La buntaj koloroj kaj aromo de la floroj faras la mondon pli ĉarma kaj la homojn pli amaj al la vivo. Ni ne povas imagi, kia fariĝus la mondo sen floroj.

Ĉinio havas longan historion de flor-kulturado. Ĝi havas multe da valoraj tradiciaj specoj de floroj. La antikvuloj postlasis senombrajn poemojn pri floroj. Floroj jam fariĝis nemalhavebla parto de la vivo de ĉinoj. Florobedoj, florarkoj kaj floraj promenejoj estas grava laboro en la publikutila afero de la urboj de Ĉinio. Ĉie en grandaj urboj oni povas vidi florbutikojn. La kortoj kaj balkonoj de urbanoj estas bele ornamitaj per floroj. Ĉie en la sudaj urboj de Ĉinio oni vendas florojn: krizantemoj, umefloroj, violoj, dalioj kaj magnolioj. En floraj promenejoj oni faras gimnastikon, dancas, ludas ŝakon kaj kartojn, kaj gejunuloj kolombumas inter floroj en luna nokto.



Flora balkono

Inter floroj



Florvendisto





Flora trotuaro

Flora promenejo



AMUZOJ

Ĉinaj proverboj

Libroj kiel riveroj kondukas en ĉiuj direktoj.

Lernado, kiel ŝipo kontraŭflua, povas regressi, se ĝi ne progresas.

Oni maldiligentas en juneco, bedaŭras en maljuneco.

Tempo valoras kiel oro, tempo ne aĉeteblas per oro.

Honesto — ponto de amikeco, trompo — ponto de malamikeco.

Oni ne scias naĝi, ne irinte en akvon; oni ne scias stiri ŝipon, ne hisinte velon.

Oni ne pritondas arbojn, ili ne fariĝos uzeblaj. Oni ne prilaboras ŝtonojn, ili ne fariĝos ujoj.

Humuraĵoj

I

(*Daturo de p. 13*)

La familio de s-ro Tokuda Rokuro intime kaj solene gastigis nin. Sinjorino Tokuda estas elegante konduta kaj ĉiam ridetas. Ŝi honoris nin per la tradicia teĉeremonio.

S-ro Tokuda Rokuro estas ankaŭ multjara fidela aŭskultanto de Esperanto-elsendo de Radio Pekino kaj donis al ni grandajn subtenon kaj helpon. Mi kaj miaj kolegoj ŝuldas multajn dankojn al li. Li ankaŭ servis dum multaj jaroj kiel senlace peranto de "El Popola Ĉinio". Li plurfoje vizitis Ĉinion kaj verkis por la japana gazetaro grandan nombron da artikoloj pri historiaj ŝanĝiĝoj de Ĉinio, per kio li grave kontribuis al la amikeco kaj interkompreniĝo inter la du popoloj.

"UNU DIO, UNU MONDO, UNU LINGVO"

Tiu devizo de Oomoto estas

Xiao Ming: "Xiao Qing, ĉu vi scias, kiam la suno estas peza, ĉu matene aŭ vespere?"

Xiao Qing: "Kompreneble, vespere."

Xiao Ming: "Kial?"

Xiao Qing: "Matene la suno estas tiel malpeza, ke eĉ marondo povas ĵeti ĝin al la ĉielo, kaj vespere ĝi estas tiel peza, ke eĉ granda monto ne povas ĝin subteni."

II

"Xiao Fang, vidu viajn ŝtrumpojn, unu estas longa kaj la alia mallonga. Certe vi konfuziĝis, tuj ŝangu."

"Panjo, vidu, en la tirkesto kuŝas paro da ŝtrumpoj, ankaŭ unu estas longa kaj la alia mallonga."

III

La filo vizitis la lernejon la

unuun tagon. Kiam li revenis hejmen, la patrino demandis: "Kara mia, kion al vi instruis la instruisto hodiaŭ?"

La infano respondis: "Nenion. Sed li demandis min, kion faras unu kaj du. Mi do instruis al li, ke ili faras tri."

Anonco pri la tria konkurso de EPĈ-legado

La rubriko "Amuzoj" de la sekvanta numero okazigos la trian konkurson de EPĈ-legado "konkurso de pokalo Aeolus", subtenate de la Aeolus Aŭta Korporacio. La gajninto de la unuagrada premio (unu homo) ricevos klozonean flolvazon kun nomo Aeolus. La gajnintoj de la duagrada premio (dek homoj) ricevos ĉiu aŭtan modelon, kiu estas farita laŭ la aspekto de kvin-tuna ŝargaŭto EQF140 de la Aeolus Aŭta Korporacio. La detaloj aperos en la sekvanta numero.

sufiĉe renoma en Esperantujo. La lasta stacio de nia verda vojaĝo estas Kameoka, kie situas la Oomoto-Centro. La Esperantomovado de Oomoto delonge estas vigla kaj vaste influa. Nemalmultaj el ĝiaj aktivuloj havas tre amikajn rilatojn kun ĉinaj esperantistoj. Kiel gastoj ni invitite vizitis instalaĵojn kaj ekspozicion de la centro, partoprenis en la matena preĝado kaj prenis vegetaran dieton kune kun oomotanoj. Okazis ankaŭ amuza vespero. Intertempe ni ekskursis al Kioto, kie ni vizitis antikvajn vidindaĵojn kaj la faman kiotan turon kun agrabla mozaiko da plastikaj bildoj.

S-ro Takaŝi Agou, respondeculo de la Internacia Fako de Oomoto, konigis al ni pri Oomoto, pri ĝia devizo "Unu Dio, Unu Mondo, Unu Lingvo". La devizo spegulas la antikvan revon de la homaro pri unu granda rondo harmonia. Mi ne estas religiano, tamen mi inklinas al la lasta parto de la devizo —

unu lingvo, kiu nuntempe temas pri Esperanto. Oomoto meritas aplaŭdon pro sia alta takso, energia subteno kaj fruktodona aplikado de Esperanto.

Aparte ĝojige por mi estas, ke en la Oomoto-Centro mi renkontiĝis kun miaj malnovaj geamikoj s-ro Eizo Ito kaj fraŭlino Tataiŝi Ĉizuko, kiuj plurfoje vizitis Ĉinion kaj fervoras por la amika kontaktiĝo inter la dulandaj samideanoj.

En la 1-a de majo ni venis denove al Osaka kaj tie adiaŭis Japanion. En la aviadilo mi miris, rigardante malsupren: Strio da akvo inter Ĉinio kaj Japanio ŝajnas nur unupaŝe larĝa. Kiel proksimas niaj du landoj unu al la alia! Pli ol du horojn poste ni jam eniris en la doganejon de Ŝanhajo. Ni sentis nin kvazaŭ ĵus revenintaj de la hejmo de bona najbaro kontente kaj senlace. Nun mia koro estas ankoraŭ karesata de memoro pri la bona gastigado de japanaj esperantistoj. Koran dankon, karaj amikoj! Ĝis!



En la ĉina ĝardeno en Montrealo



En la ĝardeno

La simbolo de amikeco inter du foraj urboj

Teksto kaj fotoj de **NORMAND FLEURY** (Kanado)

RIGARDANTE la fotojn, vi pensos ke temas pri bela ĝardeno ie en Ĉinio. Sed vi malpravas...

Fakte, tiu ĉi bela ĝardeno troviĝas en Montrealo, provinco Kebekio en Kanado. La ideo krei ĉinan ĝardenon en Montrealo estiĝis antaŭ 10 jaroj, kiam ĉina delegacio venis por partopreni en Monda Florekspozicio. De tiam, la direktoro de la Montreala Botanika Ĝardeno, s-ro Pierre Bourque, havis regulajn kontaktojn kun samfakuloj en Ŝanhajo.

En 1989 la urbaj administrantoj de Montrealo oficialigis la ĝemeligon inter la 2 urboj. Simbolo de interŝanĝo kaj amikeco inter 2 kulturoj, la projekto de ĉina ĝardeno en Montrealo rapide progresis kaj jam en junio 1991 oni malfermis ĝin al la publiko.

La ĝardeno okupas 2.5 hektarojn kaj estas taksata kiel la plej granda ĉina ĝardeno en Ameriko kaj verŝajne ekster Azio. Montrealo jam fieras posedi la 3-an plej grandan botanikan ĝardenon en la mondo. La direktoro volis aldoni unikaĵojn al ĝi. Konstruita laŭ tradicia klasika ĝardenarto de Ming-dinastio (13-a ĝis 17-a jarcento), ĝi prezentas la stilon de la ĝardenoj sude de Yangzi-rivero.

La ĝardeno enhavas 7 konstruaĵojn, inter kiuj troviĝas "ŝtona ŝipo" (vidu foton), 8-flanka turo kaj grandega ekspozicia pavilono. La konstruaĵoj estas


artaĵoj en si mem. Dum 2 jaroj 300 laboristoj de plej diversaj profesioj laboris por prepari ĉiujn pecojn. La konstruaĵoj estis komplete provmuntitaj en Ŝanhajo kaj poste malmuntitaj kaj senditaj ŝipe kaj trajne ĝis Montrealo.

De majo ĝis novembro 1990, 50 ĉinaj laboristoj loĝis en Montrealo por pretigi ne nur la konstruaĵojn sed ankaŭ la ĝardenon.

Kun la plej diversaj konstrumaterialoj, entute 2 000 tunoj, la ĉinoj sendis ankaŭ 500 tunojn da ŝtonoj el Taihu-lago. Tiuj ĉi ŝtonoj estas valoraj, ĉar la akvo skulptis ilin en plej diversaj formoj (vidu foton). Aldone al ili, 1 200 tunoj da Kebekiaj ŝtonoj transformiĝis en 9-metran monteton kun akvofalo apud la 8-flanka turo.

Videblas en la ĝardeno ankaŭ pontoj, korto kun miniaturaj arboj kaj plej diversaj arkitekturaj lignaĵoj kaj belaĵoj. Krome, 200 arboj kaj miloj da plantoj estis plantitaj por finbeligi la tuton. Pinoj, aceroj, magnolioj kaj ornamaj pomarboj plej multnombros.

Vivo troviĝas ankaŭ en la ĝardeno. Mandarenaj anasoj kaj oraj fiŝoj estis aldonitaj kaj plezurigas infanojn. Okazas spektakloj de ĉinaj dancoj kun tradicia muziko, konkurso de ĉina ŝako kaj multe pli tiel ke la ĝardeno servas ankaŭ kiel prezentejo de la ĉina kulturo. ■








Interesaj ŝtonoj

Teksto kaj fotoj de LIU SIGONG

Mi hazarde konatiĝis kun s-ro Xiao Hong, vicprezidanto de la Ŝton-arta Instituto de Guizhou-provinco, kaj vizitis lian eksponejon de mirindaj ŝtonoj. Ĉiuj ŝtonoj en la eksponejo estis kolektitaj en la provinco. Pro belaj koloroj, interesaj formoj, belaj vejnoj aŭ enteno de valoraj elementoj, la ŝtonoj fariĝis raraj mineralaj specimenoj kaj gustoplenaj artaĵoj neprilaboritaj.

S-ro Kang Yuyi, vicprofesoro de la geosciencia fakultato de la Nankina Universitato, opiniis post esplorado, ke la provinco situas en la centro de la terkrusta bloko de Yangzi-Huaihe, kie la sedimenta stratumo, dika je pli ol 30 000 metroj, apartenas al Kambrio. Pro forta karsta evoluado multe nudiĝis karbonato, sekve naskiĝis multe da kuriozaj ŝtonoj.





Fingra pikturo de Gong Naichang



S-ro Gong Naichang en pentrado

SE li ne diris, vi eble ne scias, ke li havas 58 jarojn, tio eble rilatas al lia artista vivo, kiu troviĝas en florado.

Lia nomo estas Gong Naichang. En sia juna aĝo, li ja montris sian naturdotitan talenton por pentrado. En la aĝo de 16 jaroj, li, ŝatite de fama pentristo s-ro Xu Beihong, estis akceptita de la Beiping-a Arta Kolegio por lerni okcident-stilan pentradon. Ekde 1949, li okupiĝis pri scena arto 6 jarojn. En 1955, sukcesinte en enira ekzameno, li eklerenis olepentradon en la Centra Belarta Instituto kaj faris progresigan lernadon, direktate de fama pentristo Wu Zuoren. Diplomiĝinte, li ekokupiĝis pri belarta instruado kaj pentrarto.

Kun pasio al okcidentaj klasikaj olepentraĵoj, s-ro Gong diligente ekstudis ilin. Li kopiis nemalmultajn klasikajn pentraĵojn de eŭropaj majstroj. Antaŭ 10 jaroj, sur la solida bazo de plurjara pentrado, li ekprovis fingropentradon, t.e. pentri per fingroj anstataŭ per peniko, sur ŝĵuan-papero.

Kial li decidis pentri per fin-

groj kaj manplatoj, forlasinte siajn penikojn? Li respondis, ke li bezonas rekte esprimi siajn sentojn. Per nenia peniko li povas tiel bone manifesti la efikon de la pentraĵoj, kiel per la fingroj. Tio estas aparta ĉarmo de la fingra pikturo.

Komence, s-ro Gong fingropentris nur rabobirdojn kaj rabobestojn, kiaj tigroj, leonoj, agloj kaj furioziĝemaj ĉevaloj. Sub liaj manoj ĉiuj bestoj estas forte animitaj. Muĝantaj leonoj distingiĝas per siaj furiozo kaj eksterordinaraj fortoj; furioziĝemaj ĉevaloj montras sin kuraĝaj kaj belfiguraj; hundetoj aspektas naive kaj honeste, dum agloj, ĉu starantaj ĉu flugantaj, ĉiuj estas bravaj kaj malcedemaj. El ili oni klare vidas, ke la pentristo senbrue kreis ponton inter bestoj kaj homoj por sento-komunikado, kaj vekis la senfinan pensadon de la spektantoj.

Sekve de siaj daŭraj studado kaj strebado al fingra pikturo, en la lastaj jaroj s-ro Gong faris pli malfacilajn portretojn surbaze de siaj larĝaj scioj kaj profunda kono pri la homaj strukturoj. Post multfoja ekzercado li finfine kreis pozicion de portre-

toj en la kampo de fingra pikturo, tute rompinte la kadron de la tradicia fingra pikturo ĉefe pri floroj, birdoj kaj pejzaĝoj.

La fingropentritaj portretoj de s-ro Gong estas viglaj kaj plastikaj. La de li pentritaj historiaj personoj elspiras trajtojn de la koncernaj epokoj kaj tiujn de la klara personeco. Precipe la 20 pentraĵoj de arhatoj, kiujn li faris lastatempe, atingis tute novan artan nivelon. La versimilaj figuroj de arhatoj kun diversaj aspektoj ofte ravas la spektantojn.


La lingvo de la fingra pikturo de s-ro Gong estas simpla kaj sinoptika. Liaj pentraĵoj impresas vivece, libere kaj senĝene. Nun liaj pentraĵoj estas ne nur multe ŝatataj de la artista rondo enlande, sed ankaŭ kolektataj kaj konservataj de usonanoj, singapuranoj, koreoj kaj Taiwananoj.

Diligenta estas s-ro Gong en la pentrado. Eĉ en varma somero li ne ĉesigas sian pentradon. Jen emocia, jen meditanta, li en ŝvito staras antaŭ la pentra tablo. Oni prave diras: "La dek fingroj kaj koro ligiĝas unu kun alia", s-ro Gong ja fingropentras ĝuste per sia koro! ■





Pentraĵoj faritaj de s-ro Gong Naichang





Ĝjaŭzi-o, tradicia manĝaĵo de Ĉinio

Teksto de CAO WEI
Fotoj de LI CHUNGENG



LA tradicia Printempa Festo estas la plej vivoplena kaj gaja por ĉinoj, kiel Kristnasko por okcidentanoj. La Printempa Festo okazas ĝenerale en februaro. Tiam la arboj kaj herboj reverdiĝas kaj ĉiuj estaĵoj sur la tero revigliĝas, kiel nova vivo naskiĝas, anoncante komencon de nova periodo. La antikvaj ĉinoj difinis tiun tempon kiel jarkomencon.

En la Printempa Festo ĉinoj okazigas diversajn aktivadojn, ekz. ili eksplodigas petardojn por forpeli la malfeliĉon postlasitan de la malnova jaro kaj vizitas foiron por forigi la malgajon estiĝintan en la pasintaj tagoj. La popularaj manĝaĵoj en la Printempa Festo estas *ĝjaŭzi*-oj en norda Ĉinio kaj moĉio en suda Ĉinio.

Ĉi tie mi traktas nur *ĝjaŭzi*-ojn. *Ĝjaŭzi*-o aspektas kiel lunar-ko, kiu, laŭdire, simbolas ŝuforman oran aŭ arĝentan ingoton en la antikva Ĉinio. Oni manĝas *ĝjaŭzi*-ojn kun la celo sin riĉigi. *Ĝjaŭzi*-o intime rilatas al la produktaĵoj kaj ĉefmanĝaĵoj de norda Ĉinio. En norda Ĉinio abundas tritiko pro sekeco de kampoj kaj malmulteco de pluvo. Farunaĵo estas ĉefmanĝaĵo de nordaĵoj. Ili ofte manĝas vermiĉelojn,

dabingojn kaj vaporumitajn farunaĵojn, sed malofte *ĝjaŭzi*-ojn. Prepari *ĝjaŭzi*-ojn ne estas malfacile por lertaj dommastrinoj, sed estas iom malfacile por fari ilin bongustaj.

Unue oni devas bone knedi farunon, ke ĝi estu ne tro mola nek tro malmola. Poste oni devas rulpreni per bastono pastajn buletojn por fari ilin plataj kaj rondaj kaj centre dikaj kaj rando maldikaj. Tiun laboron plenumas ofte viroj, ĉar ĝi estas iom peniga. Ordinare virinoj preparas farĉon kaj farĉi la pastajn buletojn. Ĉar en malvarma sezono ne estas freŝaj legomoj en la nordo, tial brasiko konservita en la pasintaj monatoj en kelo fariĝas ĉefa ingredienco. Oni miksas brasikon kun haketita porkaĵo, bovajo aŭ ŝafaĵo kaj kun oleo, salo kaj aliaj spicoj, tiel la farĉo estas pretigita. Oni metas farĉon sur platigitan pastan buleton kaj falde kunpremas la randon. Jen *ĝjaŭzi*-o preparita.

Oni kuiras *ĝjaŭzi*-ojn en bolanta akvo. Ĉiuj familianoj, sidante ĉe tablo, prenas *ĝjaŭzi*-ojn per manĝbastonetoj kaj ilin trempas en vinagro aŭ alia spicaĵo. Kvankam ekstere estas froste, tamen en la domo estas varme. Laŭ malnova moro, oni kaŝe enmetas kupran moneron en

ĝjaŭzi-on. Tiu, kiu manĝas tiun *ĝjaŭzi*-on, estos feliĉa en la nova jaro.

Ĝjaŭzi-o en Ĉinio jam havas historion de dumil jaroj. Antikva libro diras, ke en la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 25 p.K.) jam estis manĝaĵo simila al *ĝjaŭzi*-o. La *ĝjaŭzi*-oj de Tang-dinastio (618-907) elterigitaj antaŭ kelkaj jaroj en Xinjiang, Ĉinio, estas preskaŭ samformaj kiel la nunaj. *Ĝjaŭzi*-oj ŝanĝiĝis en malsamaj tempoj kaj malsamaj regionoj de Ĉinio dum jar-miloj.

En 1984 iu *ĝjaŭzi*-restoracio en la antikva urbo Xi'an de Ĉinio lanĉis *ĝjaŭzi*-festenon, senprecedencan en la ĉina kulinara historio. Kaj tiel *ĝjaŭzi*-o, tradicia popola manĝaĵo, leviĝis al alta nivelo.

La tuta festeno konsistas el pli ol 200 specoj de *ĝjaŭzi*-oj en formoj de bestoj kaj plantoj. La vaporumita *ĝjaŭzi*-o en formo de orfiŝo kun paro da elstarantaj okuloj ĉielen rigardantaj kaj vosto iomete svingiĝanta aspektas vivece; la vaporumita *ĝjaŭzi*-o en formo de pingveno kun blanka ventro, bruna dorso kaj korpo klinita iom antaŭen estas ridinda; kaj la peoni-forma *ĝjaŭzi*-grupo sin montras ĉarma. La belaj formoj de *ĝjaŭzi*-oj jam ĝuigas homojn, por ne paroli pri ilia bona gusto.

Ankaŭ farĉoj de *ĝjaŭzi*-oj estas renovigitaj. Farĉo el haketita holoturio, kalmaro aŭ aliaj marproduktaĵoj estas aparte bongusta.

Ĝjaŭzi-oj estas pli kaj pli ŝatataj de eksterlandanoj. Kiam ili vojaĝas en Xi'an aŭ Pekino, ili ankaŭ tie gustumas *ĝjaŭzi*-ojn. Por disvolvi la tradicion ĉinan kulinaran kulturon, la *Ĝjaŭzi*-festena Korporacio de Xi'an starigis siajn filiojn en Japanio kaj Singapuro, por ke ankaŭ eksterlandanoj povu ĝui bongustajn ĉinajn *ĝjaŭzi*-ojn. ■

Preparado de *ĝjaŭzi*-oj



Senlaca fotistino



Shen Ying

Ujgura knabino

Foto de SHEN YING



NI faris intervjuon en montregionoj, kaj kelkhora vojaĝo lacigis nin ĉiujn, sed nur ŝi, pli-ol-50-jara, ankoraŭ estis energiplena. Dum la vojaĝo ŝi ĉiam kunportis pezan sakon kun fotoaparato. Kien ajn ni venis, ŝi ĉiam la unua observis la lokon. Jen ŝi kaŭriĝis, jen ŝi stariĝis, jen ŝi kuŝiĝis surtere por foti. Ŝi estas neniu alia ol Shen Ying konata preskaŭ de ĉiuj en la kultura kaj arta rondo de Hebei-provinco.

Ŝi komencis okupiĝi pri fotografado en la 38-jara aĝo. Ŝi organizis fotografan grupon por konigi al aliaj lokoj de Ĉinio kaj al aliaj landoj kaj regionoj la reformadon, malfermon, ekonomian konstruadon, pejzaĝojn kaj turismon de la regiono Cangzhou de Hebei-provinco kaj akceli interŝanĝon inter Cangzhou kaj la ekstera mondo. Siatempe ŝi estis malsperta en fotografado kaj vidis, ke en la regiono preskaŭ neniu entreprenis tiun laboron pro la malriĉeco kaj fermiteco. Por kulture kapablulojn, ŝi funkciigis fotografian kurson kaj invitis fakulojn gvidi la kurson. En ŝia domo ofte kolektiĝis amatoroj el lernantoj, oficistoj, laboristoj, instruistoj kaj kamparanoj. Post nelonge ŝi fondis "Novaj-bildgazeton de Cangzhou", kiu havigis al komencantoj de fotografio terenon por publikigi siajn verkojn. Ŝi gvidis siajn kamaradojn al la kamparo kaj urbetoj por fari intervjuon. En ĉiuj gubernioj de la regiono troveblas ŝiaj piedsignoj.

Post kelkaj jaroj la Fotografia Asocio de la regiono havas jam 70 membrojn, kiuj rapide kreskis kiel semoj sur fekunda tero. Kaj Shen Ying ne nur bone ellernis fotografadon, sed ankaŭ pli kaj pli perfektigis en la arto.


En Cangzhou unuafoje okazis granda ekspozicio de fotografaĵoj. Por sukcesigi la ekspozicion, ŝi kaj ŝiaj kamaradoj laboris tagnokte. Per simplaj ekipaĵoj ili faris bonkvalitajn fotojn. Kiam Shen Ying vidis multegon da vizitantoj de la ekspozicio kaj siajn verkojn laŭdataj de ili, ŝi larmis de ĝojo.

En 1983 Hebei-provinco unuafoje okazigis ekspozicion de fotografaĵoj en Japanio. 21 el la fotografiaj verkoj de Cangzhou estis elektitaj por la



Avino kaj nepo

Foto de **SHEN YING**



Aŭtuna pejzaĝo

Foto de **SHEN YING**

ekspozicio.

Aŭguste de 1986 Shen Ying kaj ŝiaj kamaradoj elektis 105 el siaj fotografiaj verkoj kaj ekspoziciis ilin duonmonaton en montrofeneŝtroj aranĝitaj de la Ĉina Fotista Asocio ĉe movoplana strato de Pekino por prezenti la novan fizionomion de Cangzhou. Tion raportis iuj gazetoj kaj ĵurnaloj. Oni diris, ke tio estas debuto de Cangzhou en granda urbo. En 1987 Shen Ying kaj ŝiaj kamaradoj montris sian talenton en la Ĉina Akrobatika Festivalo. Ili faris grandan kvanton da fotoj pri la festivalo, el kiuj 50 estis publikigitaj en "Observo", "Ĉinio Hodiaŭ", "Turismo en Honkong" kaj aliaj gazetoj.

Shen Ying akiris brilajn sukcesojn kaj en la fotografado kaj en la gvido de la Fotografia Asocio de la regiono. Ŝiaj pli ol 200 fotografaj aperis en gazetoj en- kaj eksterlandaj. En la 14-a kaj la 15-a Ĉinaj Ekspozicioj de Fotografaj dufotoj en la Ĉina Ekspozicio de Virinaj Fotografaj verkoj estis montrataj kaj premiitaj, kaj 31 el ŝiaj fotografaj estis ekspoziciataj en Japanio, Sovetunio, Koreio, Belgio kaj Germanio. En 1988 ŝi estis elektita kiel elstara fotistino de Cangzhou-regiono. Iuj diris, ke ŝia plej elstara kontribuo estas tio, ke ŝi prosperigis la fotografion de Cangzhou.

Shen Ying diris, ke 1988 estis riĉrikolta jaro por

ŝia fotografa grupo. Tiujare ili ne nur fotis kaj eldonis 6 grupojn da faldeblaj bild-folioj kaj ankaŭ verkis dramojn por 6 televidaj filmoj.

Shen Ying havas ne nur multajn ĉinajn amikojn, sed ankaŭ iujn alilandajn amikojn. Iam ŝi invitis alilandajn specialistojn laborantajn en Pekino al la pitoreska Baiyangdian-lago de Hebei-provinco, kaj ili fariĝis ŝiaj bonaj amikoj.

Atingi grandan sukceson estas tre malfacile por virinoj. Shen Ying devas unuflanke strebi en sia kariero kaj aliflanke plenumi pezan hejmlaboron. Feliĉe ŝi havas bonan edzon. Kiam venis gastoj, ŝia edzo helpis ŝin en akceptado. Kiam ŝi bezonis scenaron, li verkis por ŝi. Ŝi ŝerce diris: "Mia edzo estas generalo sub mia gvido." Iuj 50-jaruloj volas kvietan vivon, sed ŝi ĉiam estas simila al fajro. Ŝi diris, ke ŝi devas ankoraŭ fari multe da laboroj kaj ĉiam sentas, ke tempo ne sufiĉas por ŝi. Ŝi ne ripozas en dimanĉo, eĉ en ferioj ŝi iras al kamparo por fotografado.

Sur muroj de ŝia dormoĉambro troviĝas paperoj kun vortoj "Koloro — eble subtraho estas pli ĉarma ol adicio", "Skizo — eble simpleco estas pli konvinka ol komplekso" kaj "Elstaraj fotoj estas tiuj kun klara celo kaj plej bona esprimo".

Shen Ying estas ordinara ĉina virino, kiu ne konas maljuniĝon. ■

Amuzaj sportoj

LA nordorientanoj de Ĉinio plejparte estas optimismaj, kio montriĝas en ilia laboro kaj amuzo.

De la lastaj jaroj la amasa sportado en la Nordoriento vigle disvolviĝas, precipe amuzaj sportoj sufiĉe populariĝas inter la popolo. Unu el ili estas *jangge*-danco. Kiel popola danco naskita en la agrikultura laboro, ĝi furoras en nordorienta Ĉinio. Alivestita, oni dancas kun ventumilo, poŝtuko aŭ kolora silka rubando en manoj. En la pasinteco tia spektaklo okazis nur en vilaĝoj, en festotagoj. Sed lastatempe en la urboj kreskis diversaj sportoj, sekve ankaŭ tie disvolviĝis *jangge*-danco, ŝatata de pli kaj pli multaj urbanoj.

Laboranto de la Changchun-a Sporta kaj Fizikkultura Komisiono diris al mi, ke en la urbo estas 40-50 ekzercejoj matenaj kaj vesperaj. En ĉiuj ekzercejoj ne mankas amantoj de *jangge*-danco. Post vespermanĝo multaj laboristoj kaj oficistoj komencas sin ekzerci. Tiutempe aŭdiĝas tamburado, gongado kaj *surna*-ado (ludo de ia blovinstrumento). Ĉu viroj, ĉu virinoj, ĉiuj dancas kun malfaldita ventumilo en la dekstra mano kaj kun ruĝa poŝtuko en la maldekstra. Ĉirkaŭ ili staras multaj rigardantoj. La ekzercado plezurigas kaj refreŝigas la partoprenantojn.

La dancado estas ŝatata ne nur pro sia saniga efiko, sed ankaŭ pro sia riĉigo de la kultura vivo de laboristoj kaj oficistoj.

Por vekti pli da intereso de la partoprenantoj por sportado kaj al-

tiri multajn aliajn al ĝi, oni kreis novajn sportojn. Mi prenu kiel ekzemplon la Shenyang-an Fabrikon de Elektraj Maŝinoj. Laŭ sia cirkonstancaro la fabriko elpensis serion da novaj sportoj. Ili kreis por junuloj streĉajn kaj penigajn sportojn, kiaj "Stafetkurado por deŝiri vinberojn" kaj "Grentransportado per ĉareto", kaj por laboristinoj kaj mezaĝaj kaj maljunaj laboristoj facilajn kaj gajajn sportojn, kiaj "Edzino kun edzo survoje al la hejmo de la patrino" kaj "Stafetkurado de Mickey Mouse kaj Donald Duck". La rekvizitoj por tiuj sportoj estas faritaj el ne plu uzablaj pecoj de produktado.

Ĉiufoje, kiam en la fabriko okazas amuzo kunveno, oni senescepte aranĝas konkursojn de amuzaj sportoj mempreparitaj. Mi ekzemplu la sporton "Urso deŝiras maizospikon". Por sin alivesti kiel urson, la ludanto devas porti maskon de urso sur la vizaĝo kaj plastospongajn ursopiedojn sur la ma-

noj kaj piedoj. Kun aspekto ridigala li ŝanceliĝe kuras por deŝiri maizospikon kaj poste plenergie rapidas al la celloko. "Edzino kun edzo survoje al la hejmo de la patrino" estas alia ekzemplo! Tuj post la signaldono ĉiu paro da "geedzoj" sin pafas antaŭen. Kurinte 30 metrojn, la "edzino" surdorsigas pupon kaj prenas subbrake skatolojn da kukoj, kun unu koko en la maldekstra mano kaj kun unu anaso en la dekstra, helpate de sia "edzo". Tuj post tio la "edzo" devas preni kelke da boteloj da "Maŭtajbrando" grandaj kiel sitelo kaj preni en la brakojn fruktojn kaj kelkajn akvomelonojn faritajn el kolorigita korbopilko. Poste ili kuras al la celloko. Kaj estas malpermesite, ke kiu ajn portata objekto falu surteren. Kiom malfacile estas gajni la ludon!


En 1990 la fabriko unuafoje okazigis amuzan sportkunvenon kun partopreno de centoj da maskitaj laboristinoj. En la lasta jaro

Konkurso de palankenado





Irado en ŝuoj el ligna plato



Kiu estas plej forta?

la fabriko okazigis grandan amuzan sportkunvenon, kiun partoprenis triono de la laboristoj de la fabriko. La konkurso iris tiel streĉe kaj interese, ke la rigardantoj eksplodis de ridego. La popularigo

de amuzaj sportoj multe pliriĉigis la kulturen vivon de laboristoj, plifortigis ilian unuigon kaj akcelis la produktadon. Iuj ĉefaj ekonomiaj normoj de la fabriko en 1991 estis pli grandaj ol tiuj en 1990.

Sekvante la ekzemplon de la Shenyang-a Fabriko de Elektraj Maŝinoj, oni praktikas similajn sportojn en ĉiuj provincoj de la Nordoriento kaj eĉ en aliaj provincoj de Ĉinio. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Graeme Taylor, 26-j., dez. kor. precipe pri tajĝiĉuan, uŝuo, religio ks. Adr.: 171 Liff Road, Dundee DD2 2TG, Skotlando.

* Membroj de E-klubo dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Kazahia SSR, SU-466200 u. Ŝevĉenko, 27-32-83, Golovenkov Sergeo.

* Mindaugas Grumadas, 13-j., dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj, interesiĝas pri ŝako, sporto kaj historio. Adr.: Mimoson - 15, Jirkiliŝkui pŝt, 234318 Kaunas, Litovio.

* Interŝanĝi kun aliaj amikoj korespondon kaj koni pri la vivo en viaj landoj interesas nin. En Bajamo la plej granda problemo estas manko de necesaj materialoj, ĉar oni ne povas rekte aĉeti gra-

vajn verkojn el eksterlando. Adr.: Poŝtkesto 188, Bajamo 1 85100, Granmo, Kubo.

* Mao Jiamo, administranto de importa-eksporta kompanio de teo, dez. kor. kun entreprenistoj de ĉiuj landoj kaj regionoj pri esploro, investo kaj negoco. Adr.: Str.: Baiyan 57, Wanxian Diqiu Chaye Jinchukou Gongsi, Wanxian 634000, Sichuan, Ĉinio.

* Ŝikoblu volas korespondi kun ĉinaj esperantistoj, interesiĝas pri ekologio kaj arkitekturo. Adr.: CP 2001-Napal-Rn-59081-Brazilo.

* Sendu bildkarton kun Esperanta teksto sur la bildflanko al Sinjorino Jongbloed, Van Ostadelaan 72, 1701LK, Heerhugowaard, Nederlando. Skribu vian adreson kaj vi ricevos karton de mi.

* Marko Paprocki, 33-j. edzo, volas korespondi kun esperantistoj el orientaj landoj, interesiĝas pri Esperanto, poezio, joko, budhismo, tao, zen ktp. Adr.: ul. Obroncow Pokoju 17, 63-600 Kapno, Pollando.


* Rasa Gadzinskaja, 25-j. ŝak-

trejnistino, dez. kor. tm. Esperante, itale, germane kaj ruse pri diversaj temoj, interesiĝas pri ŝakoj, lingvoj, kolektas bildkartojn kaj monojn. Adr.: Ukrainskaja 37-2/18, 285200 Kolomyja, Iv-Frank obl, Ukrainio.

* S-ro Ĉaproĉkij Romuald, 26-j., dez. kor. kun ĉinaj esperantistoj, interesiĝas pri lingvo, kolektas pm. kaj bk. Adr.: 232005, Vilnius, Krokuvos 7a-29, Litovio.

* Barabas Suzanna, instruistino pri matematiko en bazlernejo, deziras korespondi kun gesamideanoj el Ĉinio, precipe kun instruistino aŭ profesorino, multe interesiĝas pri historio, kulturo, precipe pri admirinda popolaro kaj metiarto de Ĉinio. Adr.: Str. Transilvaniei nr. 8, BL ul-2 sc. C. AP. 99, 37000RADEA, Rumanio.

* Ivanov Anatolij, 19-j., loĝas kaj studas en Moskvo, ŝatas legi librojn pri historiaj temoj, tre interesiĝas pri filozofio, precipe maltradicia, psikologio. Adr.: Rusio, 125413 Moskvo, ul. Kolneĉnogorskaja d. 12, kB 3.



Bildo de ok trigramoj

Iom pri “Ji Ĝing”

de SHI PING

“Ji Ĝing” estas antikva ĉina libro kun mistera koloro. Ĝi havas grandan influon sur la orientan kulturon, same kiel Biblio sur la okcidentan kulturon.

En la antikva Ĉinio “Ji Ĝing” estis uzata ĉefe por aŭgurado, sed iom post iom ĝi fariĝis ĉioamplaksa filozofia verko.

HISTORIO

Legendo diras, ke en la prahistoria Ĉinio vivis tribestro Fuxi. Li estis kapabla observi la ĉielon levinte sian kapon kaj observi la teron sin klininte. Li povis kapti la esencon de ĉiaj aferoj. Li faris “Ok Trigramojn” por koni la volon de la ĉielo kaj la tuta universo. En “Ok Trigramoj” la trigramoj estas signoj por aŭgurado. Ili konsistas el du signoj -- kaj — kaj iliaj diversaj kunmetaĵoj. Vidu bildon de ok trigramoj.

Tiuj ok trigramoj reprezentas malsamajn naturajn objektojn kaj fenomenojn en malsamaj cirkonstancoj. Rilate la naturajn fenomenojn, ili reprezentas ĉielon, teron, tondron, monton, fajron, akvon, lagon kaj venton. Se oni parolas pri bestoj, ili reprezentas ĉevalon, bo-

von, drakon, kokon, porkon, fazanon, hundon kaj kapron. Se temas pri familiaj membroj, ili reprezentas patron, patrinon, unuan filon, unuan filinon, duan filon, duan filinon, junan filon kaj junan filinon.

En la 11-a jc a.K. en Ĉinio estis fama suvereno Ji Chang, reĝo de Zhou-dinastio (1066-771 a. K.). Li disvolvis la ok trigramojn en 64 trigramojn, tiel ke ili povas reprezenti pli multajn fenomenojn kaj ŝanĝigojn naturajn kaj sociajn. Vidu bildon de 64 trigramoj.

Ĉiu trigramo konsistas el pluraj horizontalaj strekoj longaj kaj mallongaj. La strekoj nomiĝas pozitiva aŭ negativa *jaŭ*-o, tiel ĉiu trigramo havas 6 *jaŭ*-ojn kaj la 64 trigramoj havas entute 384 *jaŭ*-ojn. Ji Chang faris klarigojn pri la 64 trigramoj kaj la 384 *jaŭ*-oj, transforminte la ok trigramojn en 64 trigramojn. Jen naskiĝis la ĉefa enhavo de “Ji Ĝing”, kiu tiam servis ĉefe kiel verko de aŭgurado.

Por la ordinaraj homoj la klarigoj faritaj de Ji Chang pri la trigramoj kaj *jaŭ*-oj estis malfacile kompreneblaj. En la periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-221 a.K.) fama ĉina

erudiciulo Konfuceo plenumis verkon “Ŝi Ji” el 10 ĉapitroj por helpi studi “Ji Ĝing”. “Ŝi Ji” klarigas ĉefe la enhavon de la trigramoj kaj *jaŭ*-oj kaj pluapase klarigas la teorion de “Ji Ĝing”, tiel oni nomas la libron ankaŭ “Ji Ĝuan”. Ĝenerale, la posteuloj rigardas ĝin kiel parton de “Ji Ĝing”. Kaj “Ji Ĝing” iom post iom sin liberigis el pura aŭgurado kaj fariĝis filozofia verko.

Fakte, longan historian periodon travivis la evoluo de trigramado de Fuxi de aŭgurado ĝis kompletigo de verko kun filozofiaj pensoj. “Ji Ĝing” estis plenumita de sanktuloj Fuxi, Ji Chang kaj Konfuceo en la tri historiaj periodoj, t.e. en la prahistoria periodo, en la 11-a jc. a.K. kaj en la 5-a kaj 6-a jc. a.K. Efektive “Ji Ĝing” ne estas verko de unusola aŭtoro, sed kristaliĝo de la kolektiva saĝo de antikvaj ĉinaj filozofoj en la longa historia periodo.

ENHAVO

La homa kono formiĝas en evoluado. En la primitiva socio oni havis nur nebulan konon pri la naturo kaj socio, ne konante la leĝon de disvolviĝo de la naturo

ĉjan	ŝju	daĉu	da- ĝuang	ŝjaŭ- ĉu	da- jou	taj	gŭaj
song	kan	meng	ĝje	hŭan	ŭej- ĝji	ŝi	kun
dun	ĝjan	gen	ŝjaŭ- gŭo	ĝjan	lju	ĉjan	ŝjan
uŭang	tun	ji	ĝen	ji	ŝike	fu	suj
goŭ	ĝing	gu	heng	ŝjun	ding	ŝeng	da- gŭo
tong- ĝen	ĝji- ĝji	ben	feng	ĝja- ĝen	li	ming- ji	ge
foŭ	bi	bo	ju	gŭan	ĝin	kun	cuj
lju	ĝje	sun	guj- mej	ĝong- fu	kuj	lin	duj

Bildo de 64 trigramoj

kaj socio, tial oni deziris antaŭscii la feliĉon kaj malfeliĉon per aŭgurado. Jen la origino de “Ji Ĝing”. En aŭgurado oni notis la spertojn de aŭgurado kaj dank’ al resumado fare de filozofoj, kia Ji Chang, naskiĝis tekstoj pri trigramoj kaj *jaŭ*-oj. Tiusence oni povas diri, ke “Ji Ĝing” estas kristaliĝo de la saĝo de antikvaj ĉinoj en ilia aŭgurado por koni la naturon kaj socion. Dank’ al zorgema glosado fare de Konfuceo, “Ji Ĝing” fakte fariĝis filozofia verko por studo de la fundamentaj principoj de la naturo kaj socio kaj la leĝo de ilia disvolviĝo.

Antaŭ ĉio “Ji Ĝing” substrekas la senĉesan ŝanĝiĝon de la aferoj. Ĉinlingve “ji” signifas ŝanĝiĝon. La libro opinias, ke la movforto de la ŝanĝiĝo originas el la reciproka akcelo de *jin* (negativo) kaj *jang* (pozitivo), kiuj reprezentas la du trajtojn kontraŭajn kaj reciproke kompletigantajn en la universo, signatajn per horizontalaj strekoj -- kaj —,

ekz. ekzistas viro kaj virino, suno kaj luno, tago kaj nokto, sereno kaj malsereno. La ŝanĝiĝo de ĉiuj aferoj estas kresko kaj malkresko de *jin* kaj *jang*, kiuj montriĝas en tri flankoj: en la leĝo de ilia disvolviĝo, en la ŝanĝiĝo de ilia fenomeno kaj en ilia kvanto.

En la ĉina lingvo “ji” signifas ankaŭ “simplan”. Laŭ la teorio de “Ji Ĝing”, la aferoj evoluas ĉiam de la simpla al la malsimpla. Se oni konas la kaŭzon de ilia simpleco, oni konas ilian komplikan rezulton, sed ĉi-flanke oni nepre devas forigi la personan ŝaton kaj malŝaton. Surbaze de la enhavo de la trigramoj kaj *jaŭ*-oj oni povas diveni la feliĉon kaj malfeliĉon en la estonteco, tio estas aŭgurado de “Ji Ĝing”. Surbaze de la principoj pri ŝanĝiĝo oni povas diveni la rezulton en la estonteco, tio estas ĝia filozofia enhavo. En la pasinteco “Ji Ĝing” estis konata de la popolo ĉefe kiel libro de aŭgurado kaj rigardata de la in-

tektuloj kiel filozofia verko.

INFLUO

“Ji Ĝing” estas la plej grava kaj plej klasika verko en Ĉinio. De Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) ĝis hodiaŭ aperis miloj da verkoj pri ĝiaj klarigoj. La filozofiaj pensoj de “Ji Ĝing” havis gravan influon sur taoismon, konfuceanisman, medicinon, astronomion, geografion, almanakon, muzikon kaj luktarton *uŝu*-o de Ĉinio. La filozofiaj pensoj de “Ji Ĝing” vidiĝis en tiuj flankoj, kiuj prenis ilin kiel sian fundamentan teorion, dume la disvolviĝo de tiuj flankoj pliriĉigis la filozofian enhavon de “Ji Ĝing”. Hodiaŭ la filozofiaj pensoj de “Ji Ĝing” daŭre influas la ĉinan kulturon kaj modernajn sciencojn, ekz. s-ro G. W. Leibniz, la kreinto de la duuma nombrosistemo por komputiloj, diris en sia taglibro, ke li kreis la duuman nombrosistemon dank’ al la ĉina verko “Ji Ĝing”. ■

Prosperas la vilaĝo Liuminying

Teksto kaj fotoj de LIU SIGONG

MI veturis sudorienten de la ĉefurbo Pekino laŭ la Pekin-Tangshan-a Ŝoseo. La urbaj bruoj iom post iom malaperis kaj antaŭ mi prezentiĝis vicoj da altaj ventoŝirmaj forstoj kaj oraj tritikaj kampoj. La bela pejzaĝo ebrigiis min.

“Jen la vilaĝo Liuminying,” diris la ŝoforo. Post unuhora veturado ni atingis la cellokon. La aŭto eniris la vilaĝon, kiu impresis min kiel urbeto. Ambaŭflanke de la larĝa strato estas altaj cipresoj kaj novaj stratlampoj. Kaj la florbedoj ĉe la strato dissendas agrablan bonodoron de ĉinaj rozoj kaj nekona-taj floroj. La strato estas garnita per du vicoj da konstruaĵoj de butikoj, oficejoj kaj amuzejoj. Vidiĝas inter arboj du-etaĝaj konstruaĵoj, kiuj estas novaj loĝdomoj de la vilaĝanoj.

La gastama vilaĝestro Zhang Kuicheng intime akceptis nin. Li diris al ni: “La loĝantoj de Liuminying ne estas indiĝenoj. Iliaj prapatroj migris el Shanxi-provinco en la lastaj jaroj de Ming-dinastio (1368-1644). Pro malriĉeco multe da loĝantoj forlasis la vilaĝon. Tial la restantoj nomis sian vilaĝon Liuminying (Vilaĝo de Restantoj), kiu signifas, ke ili volis longe vivi tie.”

Pasis jam 300 jaroj, tamen la loĝantoj ne povis ŝanĝi la malriĉan vivon, kaj de tempo al tempo okazis transloĝiĝo aliloken. En 1982 la vilaĝo gvidata de Zhang Kuicheng

regulis la produktan strukturon: krom rizo, tritiko kaj maizo, la loĝantoj komencis kultivi ankaŭ funĝon kaj lotusradikon kaj plivastigis la kultivadon de legomoj. Ili funkciigis bredejojn de laktobovinoj, porkoj, kokoj kaj fiŝoj. Sur tiu bazo la vilaĝo starigis prilaborajn entreprenojn, kiaj fabriko de sojfabaj produktaĵoj, fabriko de soda akvo kaj prilaborejo de brutonutro. Malgrandaj metanaj basenoj troviĝas en ĉiuj kamparanaj familioj, krome la vilaĝo konstruis sufiĉe grandan metanan fabrikon, kiu liveras metanon al la vilaĝanoj por kuirado, lumigo kaj hejtado. La vilaĝo ŝanĝis la agrikulturan strukturon de nura plantado de rizo kaj tritiko kaj dank’ al tio rapide disvolvis sian ekonomion.

Kvadrataj kortoj

La vilaĝo havas 240 familiojn kun 900 homoj. En 1991 la pokapa enspezo atingis 1 800 juanojn. Pro la kreskado de enspezo la kamparanoj havis pli da mono por plibonigi siajn vivmedion kaj loĝkondiĉojn. La vilaĝestro diris: “Por konstruado de loĝdomoj ni alprenis rimedon de privata investo kaj subvencio de la kolektivo. La rekonstruado de la vilaĝo estas unuece planita kaj la vilaĝanoj estas spronitaj por mem konstrui sian etaĝdomon.” La vilaĝo donacis 4 000 juanojn al ĉiu familio, kiu konstruis sian novan etaĝdomon. En la lastaj 5 jaroj la vilaĝo investis sume 600 000 juanojn por konstrui novajn etaĝdomojn. Nun 140 familioj jam havas sian novan du-etaĝan loĝdomon kaj 60 familioj luksan loĝejon kun kvad-





Pentristino Wang Qiuju



Alilandaj turistoj en korto de kamparana familio

rata korto. Nun la kamparanoj vivas bone kaj neniu volas forlasi la vilaĝon.

Sur la balkono de sia luksa du-etaĝa loĝejo mastro Zhang Jincheng diris al mi, ke li havas 4 filojn, kiuj edziĝis kaj havas po unu etaĝdomon konstruitan laŭ la sama projekto. Zhang loĝas kun sia plej aĝa filo. La taskoj de li kaj lia edzino estas flegi nepon kaj prepari manĝaĵojn. Liaj filo kaj bofilino sin okupas pri agrikulturo. En la jarfino la familio enspezas 6 000 juanojn, dekalkulinte la elspezon por greno kaj aliaj bezonaĵoj.

Akompanate de la mastro, mi vizitis lian du-etaĝan domon. La domo kun areo de 180 kvadrataj metroj konsistas el 8 ĉambroj: 4 en la dua etaĝo kaj 4 en la ter-etaĝo. En la korto estas kuirejo kaj grentenejo. La familianoj okupas la ĉambrojn en la ter-etaĝo. Kaj la ĉambroj en la dua etaĝo estas vakaj kaj servas kiel tranoktejo de gastoj. Tiaj loĝkondiĉoj estas eniataj de urbanoj, kiuj loĝas tro dense.

Mi frapis la pordon de alia loĝejo, kies mastrino estas Wang Qiuju nomata "vilaĝa pentristino". Ŝi aĝas 31 jarojn. Post la diplomitiĝo el malsupera mezlernejo ŝi komencis memlernadon de pikturo. Poste ŝi estis instruita de fama pentristo. Ĉie en ŝia loĝejo troviĝas pentraĵoj: surtable kaj surlite. Ŝi diris al mi, ke tiuj pentraĵoj estas faritaj

por lumbilda fabriko de Pekino. Ŝi devas fari centojn da kopioj de sama pentraĵo kaj prezenti la pentraĵojn kaj novan skizon al la fabriko. Ricevinte la aprobon de la fabriko, ŝi daŭrigas la pentradon laŭ la skizo. Mi prenis unu florbirdan pentraĵon en grandeco de unu kvadrata futo. La pentraĵo montris sufiĉe bonan pikturan teknikon de la pentristino kaj en uzo de koloroj kaj en esprimo de enhavo. Mi demandis ŝin, kiom ŝi enspezas en unu jaro. Kun rideto ŝi diris: "Oni pagas al mi laŭ peco. Mi faras ankaŭ ovoŝelan pentraĵon por la Pekina Import-Eksporta Kompanio. En la jarfino mi povas enspezi 4 000 juanojn." Ŝia edzo estas simpla kamparano kaj faras kamplaboron. Li enspezas 3 000 juanojn jare. Mi demandis, kial ŝi konstruis tiel grandan etaĝdomon, dum ŝia familio nombras nur tri membrojn. Ŝi ridete diris: "Ĉiuj aliaj vilaĝanoj tiel faras, tial ankaŭ mi tiel faras."

Mi venis al alia kamparana domo, kies mastro Zhang Zhanying akceptis min en sia gasteĉambro. La ĉambro estas meblita per ŝrankoj, sofoj, elektra fridujo kaj 20-cola kolora televidilo. Mi apenaŭ kredis, ke tio estas domo de kamparanoj. La mastro regalis min per kokakolo konservita en la fridujo.

La familio de Zhang Zhanying havas 3 membrojn. Ili loĝas en ter-

etaĝa domo kun 7 ĉambroj. La domo kostas ne malmulte. La planko estas farita el artefarita marmoro. La suda fasado estas garnita per grandaj vitraj pecoj por enlasi pli da lumo.

En la vilaĝo ĉiu familio havas belan korton, kie kreskas persimonarbo aŭ granatarbo, kaj en ĉambroj kaj en korto estas diversaj floroj plantitaj en vazoj.

Sur la tegmentoj de la loĝdomoj estas sunenergia akvovarmigilo. En iuj kortoj mi vidis sunenergian kuirfornon. Kaj antaŭ ĉiu loĝdomo kuŝas malgranda metana baseno, kiu najbaras al necesejo kaj porkostalo. Sur la porkostalo estas keĵo. Iuj kamparanoj kultivas legomojn en forcejo sur la metana baseno. Tio estas "familia ekologia cirkula sistemo", pri kiu la vilaĝanoj fieras.

Hodiaŭ, en la naŭdekaj jaroj de la dudeka jarcento, la disvolviĝo de scienco kaj tekniko kaj tiu de industrio kaj agrikulturo provizas la homaron per abundaj vivmaterialoj kaj samtempe kaŭzas seriozan polucion. La homoj deziras vivi en pura, senpolucia loko. La vilaĝanoj nun klopodas krei tian idealan vivmedion. De 1983 ĝis nun la vilaĝo akceptis 2 000 eksterlandajn kaj 200 000 enlandajn vizitantojn. La vilaĝestro humure diris la mi: "Mi neniam atendis, ke la antaŭa povra loko nun ĝuas grandan famon."



En kaj ekster korto



En gastoĉambro



Novaj domoj de Liuminying-vilaĝo



Maljunulinoj kaj infanoj

Sunenergia akvovarmigilo de kamparana familio



EKONOMIO

● En la ekonomie disvolviĝinta ĉemara zono de Ĉinio nun formiĝis kvar grandaj urbogrupoj: tiuj ĉe Bohai-marĉo, la delto de Yangzi-rivero, la delto de suda Fujian kaj la delto de Perlo-rivero. Ili respektive havas Tianjin, Ŝanhajon, Xiamen kaj Kantonon kiel la centron kaj ligiĝas kun kelkaj internaciaj urbegoj kaj 60 grandaj kaj mezgrandaj urboj, kiuj okupas 13% de la teritorio kaj 41% de la totala loĝantaro de la lando. Ilia totala produktovalorĉo nun konsistigas 52% de tiu de la tuta lando. Ili estas gravaj regionoj por modernigo de la tuta Ĉinio.

● Junie de la kuranta jaro la Ĉina Internacia Aviada Kompanio malfermis novan internacian naviglinion inter Pekino kaj Vieno. La naviglinio longas 11 409 km. La tuta flugo bezonas 16 horojn. Aviadilo Boeing 767 faras iron kaj reiron ĉiuvendrede.

● Brandofabrikao Luzhou Laojiao de Sichuan-provinco lastatempe prezentis la plej luksan brandon "Ora Kavaliro". Unu botelo da vino kostas 1 500 juanojn (5.45 juanoj = 1 USD).

Junie de la kuranta jaro la brando de la brandofabrikao gajnis la oran medalon en la Internacia Manĝaĵa Foiro '92 en Hongkongo. Tio estis la kvina ora medalo gajnita de la fabrikao ekde 1915, kiam la fabrikao unuafoje akiris oran medalon en la Internacia Foiro en Panamo.

● En junio fondiĝis en Pekino la Ĉina Kampara Energi-faka Asocio.

En la lastaj dekkelke da jaroj la Ĉina Agrikultura Ministerio aktive diskonigis energi-ŝparan teknikon, disvastigis la metanan uzon, ekspluatigis la sunan, ventan kaj tervarman energiojn, kaj multe sukcesis en energio-ŝparado en la kamparo. Surbaze de la progreso de la scienco kaj tekniko, rapide altiĝis la teknikan nivelon por ekspluati regenerajn energiojn, disvolvi kaj fortigi la ekonomiajn entojn en la kamparo, akceli la kreskon de la kampara energia merkato: tio estas peniga misio de la Ĉina

Kampara Energi-faka Asocio.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

● La ĉinaj kaj usonaj personoj de la scienco kaj teknika rondo informis, ke Ĉinio kiel grava kunlaboranto partoprenos en la konstruado de supera superkonduktiveca koliziilo de Usono. Tiu konstruo bezonas 8 249 milionojn da USD kaj ĝi estas la plej granda scienco konstruo en la jarcento. Kiel internacia laboratorio por esplorado de baza konstruo de materio kaj ĝia movado, la koliziilo servos al fizikistoj de la mondo.


● En Ĉinio oni inventis senvenenigan karton kontraŭ nikotino. Tio alportis al fumantoj ĝojon, ke ili povas kaj ĝui plezuron de fumado kaj ne damaĝiĝi de nikotino.

La karto estas farita el karaj mineraloj. Oni bezonas nur ŝovi la karton en granda pokerkarto en cigaredujon kaj post 12 ĝis 16 horoj la veneno de nikotino estas malkomponita.

KULTURO

● La unua kompleta verko pri naciecaj artoj "Arta Vortaro de la Ĉinaj Nacimalplimultoĵ" estis eldonita de la Ĉina Nacieca Eldonejo. La vortaro

La giganta fleksebla ventumilo



enhavas 10 000 artikolojn kun 2 300 000 vortoj kaj 300 koloraj kaj 1 000 nigra-blankaj ilustraĵoj. La vortaro estas arta, akademia kaj referenca libro.

- La ventumila fabriko Wangxingji en Shaoxing, Zhejiang-provinco, kiu havas historion de 117 jaroj, lastatempe faris 3-metrelongan ventumilon. Disvolvite, ĝi havas larĝon de 5.8 m kaj areon de 14 kvadrataj metroj. Sur ĝi 10 homoj povas kuŝi unu apud alia. La giganta fleksebla ventumilo estas la plej granda en la mondo. La ventumilo estas farita el kvin tavoloj da veleno kaj tegita per silko. Sur la silko estas kopiita antikva pentraĵo "Sceno apud rivero en Festo de Klara kaj Brilo".

MEDIPROTEKTADO

- Nun en Ĉinio troviĝas ĉ. 10 000 grandaj pandoj vivantaj subĉiele. Por plibonigi la protektadon al tiuj raraj sovaĝaj bestoj, la registaro difinis ilin kiel la unuaklasajn protektatajn bestojn de la lando kaj tute malpermesas ĉasi ilin. La ŝtato starigis 13 rezervejojn kun areo de 5 830 kvadrataj km en la provincoj Sichuan, Shaanxi kaj Gansu.

- Ĉinio donis grandan atenton al savo kaj reproduktigo de la pereontaj vegetaloj. La statistiko de la Forstokultura Ministerio montras, ke ĝis la fino de 1991 Ĉinio jam starigis 400 kreskigajn bazlokojn de raraj vegetaĵoj kaj rezervejojn de vegetalaj plasmoj kaj pli ol 100 vegetalajn ĝardenojn. Sekve, pli ol 1 000 specoj da vegetaloj estas savitaj kaj plimultiĝitaj.

Ĉinio havas sufiĉe abundajn riĉfontojn de vegetaĵoj. La altklasa vegetalaro nombras 32 800 speciojn, t.e. 12% de la vegetaĵoj de la mondo. Pro tio, ke la plejparto de la teritorio de Ĉinio ne estis kovrita de glacio en la kvaternaro, nun restas en Ĉinio 200 genroj kun 10 000 specioj da antikvaj vegetaloj de la norda hemisfero, kiel metasekvojo (*Metasequoia glyptostroboides*), ĉina cipreso (*Glyptostrobus pensilis*) kaj ginko (*G. biloba*).

- Tibeto de Ĉinio kun areo de 1 200 000 kvadrataj kilometroj havas multe da raraj sovaĝaj bestoj. La arbaroj, herbaroj kaj aliaj vegetalaj grupoj interplektas per si tre belajn pejzaĝojn sur la altebenaĵo. Tial kvarono de la teritorio jam estas difinita kiel rezervejoj.

SOCIO

- Ekde la 1-a de julio, ĉinaj civitanoj kun ordinara pasporto ne bezonas denove fari al la koncerna



Rara abio protektata de la ŝtato

instanco oficialan peton por reelira permeso kaj plenigi registran karton por reeliraj personoj. Tiu faro de la polica instanco favoras al la ĉinaj civitanoj vojaĝantaj eksterlanden pro privataj aferoj.

TURISMO

- Arbara turismo estas aparta turismo, kiu vekis grandan intereson kaj ŝaton.

En la reformo de forstokulturo la arbara turismo rapide disvolviĝas kaj fariĝis unu el la gravaj konsistigaj partoj de la verdaj entreprenoj. Nun post la sankcio de la Forstokultura Ministerio stariĝis 91 arbaraj parkoj kaj 14 internaciaj ĉasejoj en Ĉinio. La instancoj de la Forstokultura Ministerio investis 100 milionojn da janoj kaj konstruis hotelojn, restoraciojn kaj butikojn kun totala areo de 100 000 kvadrataj metroj en arbaraj turismaj regionoj. Ĝis la fino de 1991 cent milionoj da ĉinoj kaj alilandanoj faris arbaran turismon en Ĉinio.

SES TENDENCOJ DE PORDMALFERMO DE ĈINIO

Famaj ekonomikistoj resumis ses tendencojn de pordmalfermo de Ĉinio en la naŭdekaj jaroj:

1. Laŭ la amplekso, la malfermo antaŭenpuŝiĝas de suda al norda Ĉinio. 2. La movado profundigas. Ne nur orienta, sed ankaŭ okcidenta Ĉinio faras pordmalfermon. 3. En Ĉinio la pordmalfermo iom post iom disvastiĝas. 4. La kuninvesta traktato montras, ke la kunlaboro kun eksterlandaj komercistoj pli kaj pli longiĝas. 5. La maniero de malfermo evoluas. En la unua tempo de pordmalfermo oni unue konstruis "neston" kaj poste venigis "birdon". Nun oni venigis "birdon" por konstrui "neston" aŭ konstrui "neston" kune kun "birdo". 6. Rilate reformadon, ĝi antaŭenpuŝas la pordmalfermon.

SUKCESO DE HAVENKONSTRUO EN ĈINIO

De post 1949 Ĉinio rapidigis konstruadon de ĉemaraj havenoj, ke la jara ŝarĝ-malŝarĝa kvanto kreskis al 500 milionoj da tunoj, sed antaŭ 1949 estis ne pli ol 5 milionoj da tunoj. En 1949, post rekonstruo de la Nova Haveno de Tianjin, oni ĉefe konstruis la havenon de Zhanjiang kaj faris la unuan paŝon en memkonstruo de granda haveno. Samtempe estis konstruita ankaŭ serio da novaj havenoj kun grandaj modernaj ankrejoj, tiel la ŝarĝ-malŝarĝa kvanto kreskis kaj la havena dispozicio pliboniĝis. En Ĉinio estas pli ol 200 ĉemaraj havenoj kun pli ol 1 500 ankrejoj, inter kiuj estas 350 profundaj ankrejoj.

Inter la ĉefaj ĉemaraj havenoj la duaperioda Huangdao-olekajo de Qingdao-haveno, kie povas ankriĝi 200 000-tonela ŝipo, estas finkonstruita, tamen ankoraŭ ne inaŭgurita. Nianyuwan-kajo de Dalian-haveno estas la plej granda olekajo, tie povas ankriĝi 100 000-tonela ŝipo kaj ĝia jara ŝarĝ-malŝarĝa kvanto estas 15 milionoj da tunoj. La plej granda karbokajo estas la unua-, dua- kaj triaperiode konstruita karbokajo de Qinhuangdao-haveno, kiu havas sep profundajn ankrejojn kun aldonita ŝarĝkvanto de 65 milionoj da tunoj. Oni rekonstruis la malnovajn karbokajojn de Qinhuangdao-haveno kaj kreskigis la karban ŝarĝkvanton al 79 milionoj da tunoj, tiel la haveno fariĝis la plej granda karbohaveno en la mondo. Oni konstruis la dua- kaj triaperiodan karbokajon per la plej avangarda tekniko de nia lando. Ĉe la malsupra Yangzi-rivero estas konstruitaj profundaj ankrejoj en la urboj Nankino, Zhenjiang, Zhangjiagang kaj Nantong. En la havenoj de Ŝanhajo (en ĝia deka distrikto), Dalian, Qingdao, Xiamen kaj Hainan, kelkaj kajoj por diversaj estis rekonstruitaj en kontenerizitajn aŭ pluruzajn kajojn. Kelkaj kajoj de la havenoj de Nantong, Zhangjiagang, Ningbo, Zhanjiang kaj

Fuzhou estas kontenerizitaj, tiel ŝarĝ-malŝarĝado kaj transportado multe evoluis.

En Ĉinio la plej granda haveno estas tiu de Ŝanhajo. En 1983 la ŝarĝ-malŝarĝa kvanto superis 100 milionojn da tunoj kaj atingis 140 milionojn da tunoj en 1990, tiel la haveno de Ŝanhajo fariĝis unu el la kvin plej grandaj havenoj en la mondo.

LA VIVO DE LA ĈINA POPOLO PLIBONIĜAS

En la pasintaj jaroj la vivo de ĉinoj rapide pliboniĝis. Rimarkindaj ŝanĝiĝoj okazis al iliaj manĝaĵoj, vestoj kaj ĉiutagaj vivbezonaĵoj.

Sepdek mil foiroj troviĝas en Ĉinio. En iuj bazaroj de legomoj kaj flankmanĝaĵoj oni vendas milojn da specoj da ili, kiel viando, ovoj, akvoproduktaĵoj, legomoj, prilaboritaĵoj kaj duonpretaj produktoj, tiel faciligis aĉetado. En 1987 ĉiu ĉina loĝanto en urbo aŭ kamparo konsumis 7.7 kilogramojn da porkaĵo kaj du kilogramojn da kokovoj, sed en 1990 la sumo kreskis al 16.6 kaj 6.3 kilogramoj. En 1978 la tutlanda vendovaloro de manĝaĵoj estis 65.58 miliardoj da juanoj, kaj en 1990 ĝi kreskis al 396.59 miliardoj da juanoj.

Post la ekpraktikado de la politiko de reformado kaj pordmalfermo, buntaj modaj vestoj anstataŭis unukoloran Sun-Yatsen-fasonan kostumon. Oni povas aĉeti ĉiaspecajn luksajn materialojn por fari vestojn. Ĉinoj de malsamaj aĝoj portas eŭropan kostumon, mantelon, drapan surtuton, ledan jakon kaj pluman veston. En 1987 la tutlanda vendovaloro de vestoj estis 27.85 miliardoj da juanoj, kaj en 1990 ĝi kreskis al 116 miliardoj da juanoj.

Antaŭ dek jaroj en Ĉinio ne multis koloraj televidiloj, fridujoj kaj lavmaŝinoj. Nun ili jam troviĝas en ordinaraj familioj. En 1978 ĉiu centa familio posedis 0.9 koloran televidilon, 0.22 fridujon kaj 6.34 lavmaŝinojn, kaj, en 1990, 59.04, 42.33 kaj 78.41 respektive. La konataj "tri malnovaj objektoj", t.e. biciklo, brakhorloĝo kaj kudromaŝino, estis jam posedataj de ĉiuj familioj en la urboj kaj kamparo. La modernaj elektra kuirforno, klimatizilo kaj telefono iom post iom eniras en ĉinajn familiojn.

Piano, elektronika muzikilo, karaoke-aparato kaj amuza aparato alportas ĝojon al loĝantoj. En 1978 la vendovoloro de amuziloj estis 4.22 miliardoj da juanoj. En 1990 ĝi atingis 48.58 miliardojn da juanoj.

Ankaŭ la loĝkondiĉoj de la popolo pliboniĝis. En 1978 la pokapa loĝ-areo de urbanoj estis 3.6 kvadrataj metroj. En la pasintaj jaroj altaj loĝdomoj elstarigis unu post alia. Ĉiujare milionoj da familioj transloĝiĝis en novajn domojn. La pokapa loĝ-areo nun kreskis al 7 kvadrataj metroj. En 1978 la pokapa loĝ-areo de kamparanoj estis 8.1 kvadrataj metroj, kaj nun 18 kvadrataj metroj.

Qinghai-lago sur altebenaĵo

Teksto de WANG XIAN

Fotoj de ZHENG YUNFENG

CU estas vasta etendaĵo de akvo sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo? Jes. Kvankam ĝi ne estas maro, tamen ĝi havas grandecon, imponecon kaj belecon de maro. Ĝi aspektas tute kiel maro.

Trapasinte la Sun-lunan Monton, ni tuj veturis al senlima Qinghai-lago.

VOJAĜO AL QINGHAI-LAGO

Qinghai-lago kvazaŭ okulo sur la altebenaĵo estas blua, brila kaj ĉarma. Cirkulas multaj legendoj pri ĝi. Iuj diris, ke ĝi formiĝis el magia spegulo, kiun princino Wencheng de Tang-dinastio forĵetis de sur la Sun-Luna Monto. Fakte, ĝi formiĝis ne en la tempo, kiam princino Wencheng veturis al Tubo-regno por edziniĝi antaŭ 1 300 jaroj, sed en la grandioza montiĝa movado antaŭ 130 000 jaroj. Tiam la leviĝinta Sun-Luna

Monto baris la vojon de Buha-rivero al la antikva Flava Rivero, kaj faris la grandan marĉon grandega interna lago. Sendube, sen la Sun-Luna Monto ne ekzistus Qinghai-lago. Ili estas ĝemeloj sur la antikva vojo al Tibeto.

Ĉiĉerono demandis al mi: "Ĉu vi scias, kiom granda estas Qinghai-lago?" Mi mutis antaŭ lia mistera kaj fiera mieno. Li, svingante sian brakon, diris al mi laŭvoĉe: "Memoru la onidiron: 'Por ĉirkaŭiri la lagon, konsumiĝas bona ĉevalo de kuro kaj mortas cervo de laco.' Ĉu vi komprenas? Jen tiom granda estas Qinghai-lago!"

Ni rapide veturis ĉirkaŭ la lago, kio forrabis de ni tutan tagon. Por detale rigardi Qinghai-lagon vere konsumiĝos bona ĉevalo kaj mortos cervo.

Qinghai-lago kviete kuŝas sur la loko alta je 3 200 m super la mar-nivelo. Ĝi, longa je 106 km de

oriento al okcidento kaj larĝa je 60 km de sudo al nordo, kovras areon de pli ol 4 500 kvadrataj kilometroj. Qinghai-provinco ricevis sian nomon ĝuste pro la lago.


INSULO DE BONAJ ĈEVALOJ

Fotante Qinghai-lagon en aviadilo, ni vidis malgrandajn insulojn en malproksimo. Iu similas al verda folio; alia aspektas kiel mam-pinto; tria kvazaŭ grandega baleno flosas sur akvo.... La Bird-insulo, Lagomezza Monto kaj Tripeca Roko estas insuloj, kiuj ĝuas renomon en Qinghai-lago.

Post unu-hora veturado de Nanya-kajo per motorboato, ni atingis la insulon Lagomezza Monto. La insuleto en la formo de baleno longas maksimume unu kilometron de sude norden. Ĝi, alta je 50 m super la akvosurfaco, sole eltenas akvan frapadon. Ni ŝanĝis motorboaton per prameto por surbordiĝi. Sur la insuleto kreskas herboj altaj ĝis genuoj. Tie troviĝas neniu konstruaĵo, escepte de malgranda templo. Bonodora fumo el forno antaŭ la templo leviĝadis. Iu ĉirkaŭ-20-jara bonzo en malhelruĝa stolo tie preĝis. Poste mi informiĝis, ke li venis de Changdu de Tibeto por daŭrigi sian memkulturadon. Oni diras, ke en ĉiu vintro, post glaciigo de Qinghai-lago, iuj lamaoj venas ĉi tien kaj forlasas la insuleton en la venonta vintro, kiam Qinghai-lago refoje glaciĝas. Tiu budhisma loko funkcias kiel paradiza mondo en ilia koro, ke la terura soleco estas tute ignorata.

La historia kroniko tiel notis pri Lagomezza Monto: "Ĉiuvintre post glaciigo oni pelis bonrasajn ĉevali-

Skemo de la antikva vojo Tangbo





Ĉe Qinghai-lago



Paŝtistoj en la festivalo

nojn ĉi tien. En sekvanta printempo ĉiuj ili gravediĝis kaj naskis superegajn ĉevalidojn.” Laŭdire, en la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 25 p.K.), la insidema kortegano Wang Mang post malsukceso en la ŝtatrenverso paŝtis ĉevalojn tie. Li ricevis bonspician ĉevalon Qinghaicong, kiu povis galopi 500 km. ĉiutage. Kiam imperiestro Yang Guang (605-616 sur la trono) de Sui-dinastio inspektis okcidenten, li ordonis paŝti ĉevalinojn tie por ricevi superegajn ĉevalojn, kaj oficiale investis imperiestran ĉevaliston tie. Granda ĉina poeto Du Fu de la 8-a jarcento laŭdis la ĉevalon Qinghaicong: “La ĉevalo estas senrivala en bataalkampo.” Tiuj legendoj aldonis al Qinghai-lago multajn interesojn. Nun ankoraŭ viglas gregoj da ĉevaloj sude de Qinghai-lago. Tiuj malaltstaturoj kaj malgrandaj oreloj kuras rapide. Laŭdire, ili estas posteuloj de la superegaj ĉevaloj. Pro tio la Lagomeza Monto ricevis alinomon Insulo de Bonaj Ĉevaloj.

Hodiaŭ la Lagomeza Monto fariĝis soleca kaj kvietita. Kiu povas imagi al si, ke ĝi estis grava fortikaĵo sur la antikva vojo al Tibeto antaŭ 1 300 jaroj? En la batalo ĉe Shibao-urbo inter Tang-imperio kaj Tubo-regno, du mil soldatoj de Tang-imperio gvidate de fama generalo Geshu Han garnizonis sur la insuleto kun areo de unu kvadrata kilometro. Nun, vento el Qinghai-lago forviŝis ĝian tiaman gloron, kaj la insuleto restas kvietita kaj paca.

KULTO DE QINGHAI-LAGO

En la 4-a de majo ĉiujare okazas

solena lagkulta aktivado sur Qinghai-lago. Jam estis varmega somero, kiam ni venis tien la unuan fojon. En la sekvinta jaro ni havis ŝancon por ĉeesti la solenan festivalon.

Antaŭvespere de la festivalo aperis urbo de jurtoj sur la ĉelaga stepo. Ĉevaloj en vicoj galopis, aŭtoj kuradis, etkomercistoj kriis, kaj la stepo subite fariĝis brua.

Tie la kulta altaro pli ol 5 m alta staris kiel la dio de l' monto sur la plej alta loko. Ĝi estis ĉirkaŭvolvita per salikbranĉoj zorge ornamitaj per blanka ŝaflano, sur ĝia supro estis faskoj da cipresbranĉoj.

Je la mateniĝo de la 4-a gvidate de grandaĝulo viroj arope rajdis surĉevalo al la forno antaŭ la kulta altaro. Ili ŝutis saketojn da sekalo kaj rostita faruno unu post alia kaj verŝis boteleton da brando sur brulantan fornon. La densaj fumo levigis, blovate de vento, kaj ŝvebis super la urbo de jurtoj. La miksitaj bonodoro de cipresbranĉoj, brando kaj sekalo kune formis misteran etoson.


Kiam la unua fasko da sunradioj sin ĵetis sur la lagon, la sankta lagkulta aktivado oficiale komenciĝis. Oni, tenante “saketon de trezoroj” per ambaŭ manoj kaj voĉlegante sutron, sin direktis al la lago. Unue, ili trinkis iom da klara akvo, poste lavis al si la vizaĝon kaj kapon, kaj adorkliniĝis al la Lagomeza Monto. Fine ili tutforte ĵetis la “saketon de trezoroj” en la lagon. Kies saketo ĵetiĝis pli foren kaj rapide fundiĝis, ties mastro havos bonaŭguron. Tamen sur la lago

restis iuj saketoj nedroniĝintaj, tiam iliaj mastroj senĉese voĉlegis sutron kaj preĝis. Laŭdire, tiu, kies saketo ne fundiĝis, devas fari promeson antaŭ la laga dio, aŭ peti lamaojn reciti sutron por kelkaj tagoj aŭ almozdoni al templo por ŝanĝi fatalon en bonaŭguron. Mi demandis, kion entenas la saketo. Oni respondis, ke en la saketo estas sekalo, oro, arĝento, kupro, gemo kaj juveloj. Ju pli multekosta kaj peza estas la saketo, des pli pia estas la mastro. Kiom malavara nacio! Verŝajne de tio Qinghai-lago pli kaj pli riĉiĝas.

Jus fininte la ĵetadon de la saketo, ni aŭdis bruon de galopado de ĉevaloj. Granda grego el ĉ. mil ĉevaloj alkuris de malproksime. Viva budho en ruĝa stolo sur blanka ĉevalo kuris antaŭe. La majesta grego trifoje iris ĉirkaŭ la altaro kaj forno, poste ili eniris la lagon ĝis kiam la ĉevaloj subakviĝis je la ventro. Oni diras, ke la tiel lavitaj ĉevaloj ne suferos malsanon. Tiam la krio “hura!” aŭdiĝis ĉie super la stepo. Jen la aktivado atingis sian kulminon. Poste la ĉevaloj disigis sur la verda stepo. Tie ili libere vivas kaj kreskas.

AL BOHU-LAGO


Trajno kun bruo kuris sur la Qinghai-Tibeta Fervojo norde de Qinghai-lago. Aŭtoj bluaj, blankaj kaj flavaj kuris sur la Qinghai-Tibeta Ŝoseo sude de Qinghai-lago. Qinghai-lago, ĉirkaŭita de la fervojo kaj ŝoseo, forte elspiras modernajn trajtojn, kaj la stepo fariĝis pli bela kaj pli vigla. ■



Parto de Cinghai-lago



Kulto de Qinghai-lago





Kulta altaro

Ĉe forno antaŭ kulta altaro



FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ



Ligna kirko en Östmark, Svedio
de **MALTE MARKHEDEN** (Svedio)

Norvega spegulo

de **RAYMONDE PERAULT** (Francio)

